# INTERNACIA MONDLITERATURO

## GEORGES EEKHOUD:

# SERVOKAPABLA! MARCUS TYBOUT

FERDINAND HIRT & SOHN
LEIPZIG
ESPERANTO-FAKO

*Internacia*
*Mondliteraturo*
*Volumo 20*

# INTERNACIA MONDLITERATURO

Kolekto de la plej famaj verkoj
el ĉiuj naciaj literaturoj

FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG / 1927
ESPERANTO-FAKO

GEORGES EEKHOUD

# SERVOKAPABLA!
# MARCUS TYBOUT

El la flandra (franclingva) originalo tradukis
kun permeso de la aŭtoro

**Léon Bergiers**

FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG / 1927
ESPERANTO-FAKO

ĈIUJ RAJTOJ ESTAS REZERVATAJ
COPYRIGHT 1926 BY FERDINAND HIRT & SOHN
MADE IN GERMANY

PRESEJO BREITKOPF & HÄRTEL, LEIPZIG

# TABELO DE ENHAVO

Antaŭparolo de Otto Stöber. . . 7

Servokapabla. . . . . . . . . 11

Marcus Tybout . . . . . . . . 49

# ANTAŬPAROLO

Malmulton la esperantistaro scias pri la belga literaturo. La kaŭzo estas plej simpla: maloftaj estas la verkoj de belgaj verkistoj, kiuj estas tradukitaj esperantlingve. Kaj tamen, tiu literaturo estas riĉega kaj ankaŭ tute originala. Malprave multaj opinias, ke la belga literaturo estas stil-imitaĵo de la franca verkmaniero. Granda estas ilia eraro. Ĉu la nomoj de *Charles de Koster*, la verkinto de la senmorta *Tyl Ulenspiegel*, *Camille Lemonnier*, la kreinto de la fama *Viro*, *Emile Verhaeren*, la poeto de la admirinda *Tuta Flandrio*, *Pierre Broodcoorens*, la romanisto de *La Ruĝa Sango de la Flandranoj*, *Edmond Picard*, la majstro de la *Scenoj de la Juĝa Vivo*, ne sufiĉas por pruvi la originalecon de la belga literaturo? Se ne, la nomo nur de *Georges Eekhoud* atestus venke pri tio! Ĉar Georges Eekhoud estas certe la plej originala kaj propra belga verkisto.

Ni do ĝoju pro la apero en Esperanto de verko de tiu majstro. Multaj el liaj verkoj estas mondfamaj, ekz. Kermesoj; Escal-Vigor, Miaj Komunuigoj; Kees-Doorik ktp.

Georges Eekhoud naskiĝis en la jaro 1854. Li travivis junaĝon senĝojan, senaman. Li lernis malami la progreson, la kazernojn, la modernajn gazetojn, la malliberejojn. Li amas la popolon, li amas la vagabondojn.

Ĉiam li amis la suferantojn, la mizerulojn dum li malamas la juĝejojn. Li konsideras siajn rolulojn kiel la elektitojn de la naturo, kiel la plej belajn kaj la plej bonajn el la homoj. Li sopiras al la malaltigo. Estas nur unu grandnobla sento en la tuta verkaro de Georges Eekhoud: La pasio de la artisto al la mizeruloj. Li estas la poeto de la stratulaĉoj.

Kiel la senmorta Beethoven, li opinias la *Bonkorecon* pli dezirinda ol eĉ la *Belecon.*

Li estas ne nur la ĉefo de la nuna belga literaturo, sed li ankaŭ estas unu el la plej gravaj aŭtoritatoj de tiu ĉi tempo. Li estas figuro kiel hieraŭ estis *Anatole France* kaj *Edmond Picard,* kiel estas hodiaŭ *Romain Rolland* kaj *Maxim Gorkij.*

Antaŭ ol esti belgo, li estas homo. Kaj ĉiam oni vidas lin protektanta la malfortulon, la malaltrangulon. Li elektas la defendon de la premato kontraŭ la premanto, de la suferanto kontraŭ la suferiganto.

Multaj verkistoj, kiuj en sia floraĝo estis de ĉiuj sukcesoj trafitaj, dum sia maljuneco vivaĉas ekstere de la literatura mondo, malŝatataj de la junularo: Ilia verkaro mortis. Sed la verkoj de Georges Eekhoud estas senmortaj kaj la nuntempa junularo komprenas la penson de la majstro. Ĝi ĉiuokaze aklamas tiun sepdekjarulon.

Lia altanimeco, pruvita ankaŭ dum la milito, ne plaĉis al la registaroj. Kaj en 1920 la belga registaro maldungis la verkiston, kiu estis priliteratura profesoro en alta lernejo. Li ne estas riĉega, kaj devas gajni sian vivon. Pli granda estis ankoraŭ lia morala sufero pro tiu agaĉo; kaj lia edzino, sepdekjara maljunulino mortis sekve de tiu malnoblega gesto de la belga registaro.

Tiam la intelekta junularo leviĝis kaj vigle protestis. Manifestacio okazis partoprenita de pli ol tri mil admir-

antoj de l' majstro. Antaŭ tiu skandalo la registaro timis. Nun la plenglora verkisto vivas plej simple en Bruselo, kie, malgraŭ siaj sepdekdu jaroj li daŭrigas sian laboron.

Eekhoud estas grandspritulo.

Signifas internan travivaĵon tralegi kaj pristudi liajn verkojn. Sed por fari bonan tradukon oni devas posedi la saman senton kaj spiriton kiel la kreinto. Lin ami kaj kompreni!

*Léon Bergiers* superas sin mem en la traduko de ĉi tiuj verkoj. Lia tuta sekreta anima vivo konformiras etike per vera intimo kun la majstro. Léon Bergiers mem ekvivas en „Servokapabla", fariĝas unu kun la verkisto kiel ties belsonora kantisto. Kaj ne ekzistas pli granda kontentigo por la tradukinto, ol vidi, kiel lia spirito konsentas kun Georges Eekhoud!

Homo, kiel Eekhoud, estas eterna. Li kaj lia verkaro! Ĉu vi miras, kiam mi diras, ke li vole-nevole akcelis, ke lia spiritpensado estu vivante konservata por la honoro, por ni. Ĉu li estis malprava enkondukante nian junan amikon en la literaturon belgan kaj mondan?

Vere ne!

Ne pli bona lernanto — nun jam mem konata verkisto — povus daŭrigi la gigantan idearon.

Sed ne malspirita estas la laborado de la tradukisto. Memkreinte ankaŭ li naskas pensadon tute personan. Li perfektigas!

Do, neniam povus mia bona amiko Bergiers, tiel bonege traduki, sin tiel forte profundigi en la spiriton de nia Eekhoud, se ne diktus la koro propra.

Léon Bergiers mem devas servi sub la militistaj standardoj. 20-jara li nun estas. Li estas de l' reĝo devigata, ŝanĝi la poetan plumon kun la fia pafilo. Lia vigla spirito devas morti en la senpersona „Gi" kazerno!

Li mem skribis al mi:

„Baldaŭ en kazernon oni min ĵetos devige, mian plumon ili anstataŭigos per alia, pli granda: pafilo. Ha! mia koro premiĝas pensante pri tio. Mi jam vidas tiujn altajn murojn, tiun malliberecon; sed kara amiko, ĉu libereco ekzistas en tiu mondo, esence burĝema? Aŭ ĉu en koro forta, maltima ĉiam ekzistas libereco, libereco ĉiam sama, volanta, kiu post jaroj renversigos tiun mondkonstruaĵon? Jes! Tiun liberecon mi volas kunporti, pli ĝuste en mia koro enporti ĉien, kien miaj paŝoj vole aŭ devige min kondukos.

Pli bona tago leviĝas. Tie je la horizonto ĝi sin anoncas per ruĝaj radioj jam trairantaj la nigrajn nubojn, nubarojn. Suno, leviĝu!

Cin ni atendas!“

Mi kaj la homaro restos ĉe vi, karulo!

*Otto Stöber.*

## I.

Malfeliĉa Barbel Goor!

Frans estis foririnta, ŝia brava filo, la pupilo de ŝiaj okuloj, la batado de ŝia koro; — foririnta depost ok tagoj al la garnizono, — malproksime de la vilaĝo, malproksime de la lando! — perdita, transportita, tien, en la tute grandan urbon! . . .

La simplulino ne kapablas kredi la realecon kaj, leviĝinta la unua, ŝi grimpas ĉiumatene unue al la mansardo en kiu dormis ŝia knabo. Ŝi konvinkas sin pri la disiĝo nur palpante la senordigitan liton de la kapkuseno ĝis la piedo kaj serĉante vane, sub la kovrilo, tiun muskolfortan brakon, kiun iam ŝi skuis milde, timante dolorigi — kia ideo! — tiun knabegon kiel kverko solidan. Ha! la senmaliculino de l' Bona Dio kreita!

— Bonan tagon, patrino!

Kio fariĝis el tiu voĉo tiom amata?

Kiom li prokrastas etendi siajn membrojn, ĵeti siajn brakojn ĉirkaŭ ŝian kolon?

Tamen lia vestaraĉo de ĉarpentisto, lia jako kaj lia velura pantalono, lia griza antaŭtuko, lia ĉapo kuŝas amase sur la seĝo, apud la litkapo, kvazaŭ li ĵus estus ilin ĵetinta tien. Sed la parfumo de rezino kaj de pargetovakso, per kiu tiuj vestaĵoj estis saturitaj, malpliiĝas iom post iom; sed la faldoj faritaj de la lumbobatoj kaj de la elstaranta muskolaro de la laboristo baldaŭ malaperos;

kaj alproksimiĝas tiu tago, kiam la Sankta adorantino enspiros la odoron de tiuj vestaĵaĉoj kiel incenson kaj kisos ilin kiel relikvojn ne plu retrovante postsignon de l' kara foririnto.

Post malvigleca pensado ŝi fine malsupreniras.

Ŝi ekbruligas la fornon kaj muelas la kafon. Baldaŭ la akvo kantetas en la bolkruĉo. Je la sonoj de tiu muziko kaj je la aromoj pli vivigaj de l' kafo, la iluzio revenas ŝin tromplogi.

Jen ŝi verŝas la bolantan akvon kvazaŭ li devus havi sian parton de l' trinkaĵo. Ŝi preparas tri dikajn buterpanojn por Frans, kiujn ŝi staplas kontraŭ lia taso. Ŝi eĉ plenigas la ladan kruĉeton, kiun kutime li kunprenas, transŝultre ligitan, irante al la laborejo. Poste ŝi atendas la ĉiutagan bruegon en la domo. Nenio! La domanaro ankoraŭ dormas super ŝia kapo. Kaj fine la funebreco de l' ŝtuparo fariĝas tiel senlima, ke ĝi abrupte ektremigas ŝin kiel je la frakaso de eksplodo.

— Kiel stulta mi estas! Kie ankoraŭfoje vojaĝis do miaj pensoj? Ĉu li ne estas foririnta?... Ho! Frans, Frans!... La kruĉeto elglitas el ŝiaj fingroj. Malviglege ŝi lasas sin fali sur seĝon; larmoj rulintaj laŭlonge de ŝiaj pergamenecaj vangoj gutas en ŝian tason.

## II.

Aliaj infanoj restas al ŝi, sed pro kio la naturo volis, ke tiu estu ŝia pliamato? Ŝi ne nur lin amas pli ol tri filojn pliaĝajn, pli ol kvar amemajn filinojn, sed ankaŭ pli ol siajn du plijunajn infanojn: la malgranda Rup, knabo ĵus farinta sian unuan komuniiĝon[1]), kaj la ĉarma Dâ, sepjara blondulino. Barbel Goor preskaŭ ne suferis

[1]) Ceremonio de la katolika eklezio. La unua solena komuniiĝo okazas ordinare je la 11-a jaraĝo.

pro la foriro de la unuenaskitaj al Antverpeno, kie la filoj lernoservis kaj la filinoj fariĝis servistinoj. Pluraj edziĝis, sen ke tiu okazintaĵo impresis ŝin; kaj, malgraŭ la novaj elspezoj tiuj ĉi ankoraŭ penegadas por sia patrino kaj sendas parton de sia salajro. Ili estis dignaj kaj kuraĝaj infanoj, pri kiuj multaj maljunuloj estus ĵaluzaj kaj kiujn ili plejbone adorus, dum ilia patrino ilin modere amas precize laŭkonvene, senekscese.

Kiel la plimulto el siaj samulinoj de l' malriĉa mondo, la patrino sekvis siajn instinktojn kaj siajn impulsojn neniam pensante ilin analizi. Ĉio kion ŝi scias pri la kaŭzoj de sia prefero al Frans estas „ĉar la knabo similas tiom sian mortintan patron!“

Pri tiu tro entuziasma alligiteco ekzistas aliaj motivoj, pri kiuj ŝi nur dum momentoj havas malprecizan intuicion. Ŝi lasas sin forporti de tiu sento, kiel ofte animoj malpli simplaj spertas la ĉarmon de muziko aŭ de parfumo, nekonante la instrumenton aŭ la floron, kiuj ilin elspiras.

— — — — — — — — — — — —

Barbel estis filino de lignoŝuisto el Ranst, egoisma kaj avara, kiu ĝustatempe mortis por permesi al ŝi, per lia ŝparita mono elekti laŭ sia gusto sian edzon, simplan ĉariston ĉe lignovendisto en Schilde. Ili luis kaj ekkulturis farmobienon en Kessel, apud Lierre. Ili ne prosperis, ĉar ŝi naskis tro da infanoj.

La edzino, arda brunulino, havante eble en la vejnoj guteton de tiu hispana sango, kiun la trairo de la dungokavalerianoj de l' duko de Alba kaj de Farnese trude inokulis en la fiziologian ecaron blondan kaj la flegmon de la Flandranoj de la kampina regiono[1]), ne ŝparis la fortojn de sia edzo; male, ŝi konsumis ilin kiel panon.

[1]) Estas la regiono inter Antverpeno kaj la Nederlanda Limburgo (franclingve *Campine*).

Ŝi returnis tiel ofte al la alkovo kiel al la panujo, kvietigante siajn malsatojn kaj manĝante laŭ sia deziro. Kiel supozi, ke tiu vivforta „junulo“ malsaniĝus pro tiuj permesataj interrilatoj? Des pli ke li mem neniam estis satiĝinta kaj ĝenerale li denove insistis! Krom tio, li multe manĝis kaj fanfaronis, ke li kompensis ĉe la tablo tion, kion li perdis en la lito. Sep infanoj atestis tiun tro bonan konkordon.

Frerik Goor ne estis malpli kuraĝa laborante; li ege penadis por siaj geknaboj. Iun tagon speco de sinkopo atakis la paciencan laboremulon; li estis falinta plate en la sulkon, malantaŭ la plugilo, senkonsciigite, kiel per draŝilbato en la nukon. La mirige nekutimaj blekoj de liaj bovoj timige alvokis. Manlaboristoj lin portis al la farmodomo, kie la emocio daŭris ĝis kiam li rekonsciiĝis. Tute ne komprenante tiun antaŭsciigon, Frerik, tiel solida sur siaj kruroj, unue ridis pri sia rulfalo. Sed, iom poste, iun matenon, ellitiĝinte li sin sentis premegata, kaj anstataŭ mukon, lia tuso eligis sangajn kazeaĵerojn. Tiufoje, serioze maltrankvila, Barbel venigis la kuraciston el Liero. Ekzameninte la senfortiĝintan malsanulon kaj demandinte la edzinon, la kuracisto receptis severan sindetenon. La stato de la edzo ne estis malesperiga, li diris al ŝi, sed ŝi bone farus lasante lin dormi dum la nokto, se ŝi ne volus dormigi lin por ĉiam, tie, sub la sovaĝa aveno, je la ombro de la preĝeja turo. Barbel estis konsternegita. Ŝi konis kelkajn vivantojn, kiuj estis velkiĝintaj pro ĉagreno neami, sed neniam ŝi estus kredinta, ke oni tiom malsaniĝus pro troa interkomprenado!

Ioman tempon ŝi fastis.

Frans, ŝia lastnaskito jam estis dekjara. Barbel promesis al si, ke tiu infano estu la lasta. Tiom pli ke

la kulturo malmulte profitdonis. Pro la malsaniĝo de Frerik, estis necese forlasi la farmobienon, lui domaĉon kaj komenci komerceton en la vilaĝo, nur gardante bieneton por kulturi siajn proprajn terpomojn.

Dume, Frerik refortiĝis; li reprenis sian belan mienon kaj sian fortikecon iamajn, kaj saĝe akceptis laboron, kiel taglaboristo ĉe siaj ekskolegoj. Samtempe la suko refariĝis postulema. Ne estis facile al Barbel malakcepti la petojn de tiu reviviĝinto, malkontenta pro ŝiaj rifuzoj, la okuloj plenaj je humilaj petoj kaj promesoj. Ili tiel longe fastis kaj iom da feliĉo en ilia karno ilin konsolus pro la suferitaj ĉagrenoj.

Frerik ne sciis tion, kion la kuracisto estis dirinta al lia edzino. Iun tagon, kiam li tre insistis kaj, senpaciencigînte pro ŝiaj forŝoviĝoj, estis ŝin perfortonta, ŝi rakontis plorante la aferon. Li tuj mokis ŝin kaj konvinkis ŝin, ke tiu kuracisto, ŝercemulo de la urbo, volis iom amuziĝi pri ili. Lia argumento estis nerefutebla. Ambaŭ ili rekomencis kaj ne pli ŝparis sin ol je la unuaj posedoj.

Novaj infanoj venis al ŝi: la malgranda Rup, poste la ĉarma knabineto Dâ. Tiu ĉi estis kelkmonata, kiam, je aprila vespero ĉe la reveno el ilia kampo, la timigaj simptomoj reaperis ĉe Frerik Goor. Li estis malpermesinta al sia edzino kuri tiun nokton al Lierre. La sekvantan tagon, la kuracisto konstatis, ke lia stato estas senespera. Rigardante la du geknabojn en angulo de la ĉambro, li ne povis deteni koleran geston kaj diris al la patrino ilin montrante: „Estas tiuj etaj manoj, kiuj fosis la teron, por kuŝigi tien vian edzon!“

Du tagojn poste, Frerik mortis.

La malfeliĉulino rezignacie postvivis, sed neniam pardonis al si la malobeon al la kuracisto.

Ŝia Frans religis ŝin al la ekzisto. La memoro plena

je la bildo de la plej bona viro, ŝi retrovis en tiu infano, ĉefe depost la viriĝa aĝo eksterordinaran similecon al la mortinto. Ŝi kvazaŭ vidis la ĉariston viglegan — la tibikarnon bone tegitan per gamaŝo, kun kanto je la lipoj, sibliganta sian vipon — kiun ŝi iris atendi sur la ĉefstrato, kiam li kondukis lignaĵon al la urbo. Estis efektive la haroj nigraj kiel talpa felo, la okuloj brunaj, la buŝo iom granda, la mentono firma kaj kvadrata, la vangoj karnoplenaj de Frerik Goor; estis ankaŭ la sincereco, la vigleco, la kuraĝeco, la tute nobla koro de l' patro. Frans estis heredinta de sia patro siajn subitajn amelverŝojn, siajn gajajn atakojn, sian ŝercemon. La filo amuziĝis, kiel iam la edzo, farante mistifiketojn al la bona virino, malordigante la hejmon kaj turmentante ŝin kiel tabano. Ĉetable sidante, li mienis malŝati la manĝaĵojn, opiniis la supon brulgusta kaj deklaris, ke la terpomoj estas malbone kuiritaj. Ŝi estis ĉiufoje kaptita per tiuj farsoj, lerte penadis por sin pravigi, por defendi sian kuirmanieron. Ofte ŝi aspektis koleriĝinta kaj postkuris la karan koboldon. Ne sukcesante lin atingi, ŝi ĵetis sian balailon inter liajn krurojn, siajn kaserolkovrilojn al lia kapo, sed bone zorgante, neniam lin trafi. Enkore ŝi estis kontentega pro tiu malordigo; ŝi benis sian persekutanton, amuzis lin per siaj komikaj furiozoj; kiam li silentis, ŝi ektimis.

Vespere li alportis al ŝi la novaĵojn de la laborejo kaj de la strato. Ne estante gapanto, li elpensis neeblajn klaĉojn kaj kredigis al la bona virino, tre scivolema, serion da ŝercegoj pli kaj pli fortegaj, ĝis kiam mensogo vere tro kolosa aŭ la rido, kiun la mistifikanto ne plu sukcesis deteni, fine sciigis ŝin pri la vero.

Nun, tio multe mankis al Barbel. La domo estis fariĝinta malgaja kiel post la morto de la edzo. Ho! tiu soldata servo!

III.

Por ke Dio kaj liaj sanktuloj estu favoraj al ŝi la tagon de la lotado[1]), ŝi estis tamen ĉion farinta. La antaŭan jaron je Pentekosto, ŝi estis partopreninta kun sia Frans la pilgriman procesion de ilia vilaĝo al Scherpenheuvel[2]). Pli poste, kiam alproksimiĝis la neevitebla tago, ŝi faris tagnaŭon en Sankta Gomaro de Liero. La matenon de la grava ago, kiam, febranta kaj paleta li iris al la komunuma lernejo[3]), ŝi estis metinta ĉirkaŭ lian kolon sanktan bildon, benitan rozarion je la dekstra antaŭbrako, kaj en la poŝojn de lia kitelego kaj de lia pantalono tutan aron da amuletoj: fungo deŝirita dum la nokto de la sanktaj senpekuloj, dento de nigra kato, marono, sur kiu Pols, la ŝafgardisto, sorĉisto verpruvita, estis per tranĉilo skulptinta, por kelkaj centimoj, serion de magiaj ciferoj, kiuj devus sorĉe alvoki la liberigan nombron. Vere, ŝi nenion malatentis. Kiam ŝi plendis al tiu ŝtelisto Pols, pri la malmulta efiko de liaj talismanoj, li riproĉis ŝin pri la kunmiksigo de la ortodoksaj rimedoj kun la pekoj kondamnitaj de la pastro; ĉar oni ne sin turnas samtempe al sanktuloj kaj al la diabloj.

Frans estis trafinta numeron el la plej malaltaj, numero tiom malfirma kiom ilia monhavo.

Ŝi provis akiri la liberigon de la mallertulo, citante ke ŝi estas vidvino kaj ke tiu knabo ŝin nutras. Sed troviĝis, kiel ĉiam, duonoficialuloj de l' vilaĝo, aŭ eĉ kampuloj, kiuj ne malpli akre deziris konservi sian filon,

---

[1]) Ĝis 1909 estis lotado, kiu decidis pri la soldata servo. Poste leĝo devigis ĉiujn soldatservi.

[2]) Fama pilgrima loko en Belgujo. Ĉefe konata laŭ la franca traduko Montaigu (Akra Monto).

[3]) Kie okazas la lotado.

por konigi al la enskribantoj, ke restis aliaj infanoj al la vidvino.

Tiam ŝi pretekstis motivojn pro sanstato. La kuracisto de Lierre volonte atestis skribe, ke la patro de Frans mortis pro ftizo. Tio ne estis tute laŭvera, sed bedaŭrante siajn iamajn severajn parolojn antaŭ la mortlito de Frerik Goor, la bona kuracisto partoprenis tiun malgrandan trompon.

Bedaŭrinde la knabo estis perfekte farita, kiel oni ankoraŭ faras ilin en la kampina regiono. Kiam oni enirigis lin el la ĉambro, kie li estis senvestiĝinta, — miksite kun la aliaj rekrutoj — en la konsilan ĉambregon, li mirigis. La juĝistoj admirekkriis kiel kompetentuloj, kiuj fine estas renkontintaj multvaloran tipon. Neatendante pri lia embaraso, pro lia konfuziĝo troviĝi nuda kiel lumbriko antaŭ tiuj orumitaj eminentuloj, ili turnis kaj returnis lin ĉiuflanken kun ŝercoj frenezetaj. Li estis palpata, mezurata, pezata, arogante rigardata, inspektata de la piedfingroj ĝis la kapharoj, en siaj korpopartoj plej intimaj, poste, kun manbato sur la ŝultron, deklarata „Servokapabla“. Kion li atendis por foriri? Li fine sukcesis reaplombiĝi kaj petis al ili proponi sian maldevigan peton. Ili ridis pro tiu postulo, sed, en bona humoro, ili permesis al li revestiĝi kaj alporti la paperaĉon. Kiam ili konis la enhavon, ili preskaŭ krevis pro rido.

Minacata de konsumiĝo, tiu fortulo ŝultrolarĝa kaj pufvanga! Kun tiaj brustaj muskoloj! Kia ŝerco! La kolego mokis ilin. La enskribantoj ĉiam volus liveri tiun kvalitan viandon!

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Servokapabla! Frans reiris al sia hejmo tute ĉagrenita, precipe kiam li pensis pri sia patrino. Li enviis Bald Vinck-on, kiu estis fortikulo kiel li, kiun la ekspertizistoj ĵus eksigis pro netaŭgeco laŭ simpla montro de liaj

kruroj. Tiu bonŝanculo havis vejnoŝvelojn kaj neniam estis fanfaroninta pri tio! Alia kampulo de Kessel, Tiste de la „Muelejo“, estis liberigita dank' al hernio. Tio estis ankoraŭ difekto, kiun la filo de Barbel Goor ne konis kaj kiun li konsideris preskaŭ kiel donaco de l' ĉielo.

La sekvintan tagon li devis iri, sub la gvido de oficiro, al la depoto de Beveren, kie li estis denove korpe ekzamenata. Poste, oni mezuris lin, enregistris lin kaj resendis lin al lia familio provizitan per irletero.

* * *

La vintro forpasis, la someraj monatoj siavice forflugis. La vidvino opiniis, ke tiuj eminentuloj de l' registraro forgesis ŝian filon sed, iun matenon, Frans irante al la laborejo renkontis la kampogardiston, kiu prezentis al li multsurskribitan paperon vizitan de la urbestro, per kiu oni invitis lin foriri tuj al la depoto de Beveren. Ĝi estis la alvokordono. Estis necese iri, ĉar alie baldaŭ la ĝendarmoj aperus! Patrino Goor nur trovis tempon por kunigi en ruĝkatuna tuko kelkajn vestaĉojn kaj por kudri iom da mono en la fundon de lanŝtrumpo.

Ho! la mateno de la adiaŭoj! Li estis metinta sian pakaĵon ĉe la fino de bastono, kiun li tenis sur la ŝultro. La bona virino ofte spirite revidis lin, kiel je tiu horo, kun lia vizaĝo tre ruĝa kaj kelkloke tre blanka, konfuzegitan kaj vestitan per sia „plej bona“ pantalono, per pura *Kiel*[1]) kaj per sia dimanĉa ĉapo. Ŝi volis, ke li favore impresu la sinjorojn oficirojn kaj ke li ne estu maldistingata inter la vaguloj samtempe kaptitaj kun la filoj de honestaj gepatroj.

Ŝi akompanis lin ĝis Lierre, kvankam li estis mal-

[1]) Kitelo speciale flandra.

konsilinta tion por mallongigi la emocion: „Ne — li estis dirinta, kun okuloj ruĝaj apenaŭ ne plorantaj — mi estus malpli saĝa, ci forprenus mian tutan kuraĝon“.

Survoje, ili haltis kiel je la haltoj de kalvaria vojo, antaŭ tiuj ĉarmaj kapeletoj alkroĉitaj al la trunkoj de la plej belaj arboj. Ŝi genuiĝis, komencis preĝon, sed ne finis ĝin kaj konklude ŝi sin turnis al sia filo, prenis lian kapon inter la manoj kaj lin rigardis kvazaŭ ŝi devus ne plu revidi lin. Poste, ŝi ekploregis.

— Ne ploru do, patrino. Mi ne iras al la fino de la tero... Mi forpasigos miajn libertempojn en la vilaĝo... Vi ankaŭ venos tien... Kaj mi skribos; Rup legos miajn leterojn, ĉu ne, Rup? Ankoraŭfoje kisu la grandan fraton, malkuraĝulo! Rup respondos al mi, kiel farus bona knabo...

Dirante: „Ne ploru!“ li aspektis tiel necerta reteni siajn proprajn larmojn, ke la malfeliĉa patrino ankoraŭ pli multe ploregis. La infanoj ĉirkaŭ ili kuretante havis mienetojn gravajn kaj embarasitajn.

Li provis ŝerci kiel dum siaj bonaj tagoj, sed tio ne plu sukcesis! Tiu malsincereca gajemo estis pli korpremiga ol ĉio alia; kaj li antaŭvidis, ke lia mensoga rido akviĝus en diluvo, kiun li sentis leviĝanta el sia koro al siaj okuloj. Tiam li plirapide paŝis, turnis la vizaĝon, ŝajnigis ian krudetecon:

„Rapidu... rapidu... ĉar mi alvenos tro malfrue.“ Kaj, per la pugno batante sian bruston, li murmuris inter siaj dentoj: „Ĉu fine ci estas viro, jes aŭ ne? Tiam ne ploru, al la diabloj!“

Ili atingis la urbon. La ĉirkaŭaĵoj de la stacidomo estis tute plenigitaj de rekrutoj ebrietaj, promenantaj enbrakiĝante de drinkejo al drinkejo. Urbanoj kaj kamparanoj interfratiĝis. Ĉiuj estis malriĉulaj odorantaj ĉu

la kampokulturon, ĉu la laborejon. Kelkaj estis metintaj je sia ĉapo tiujn diverskolorajn paperaĵojn, per kiuj oni ornamas la grasajn bovojn al la buĉejo kondukotajn kaj la bonfartajn junulojn al la kazerno senditajn.

La Goor-oj eniris en gastejon kaj petis trinkaĵon, sed la biero restis en ilia gorĝo.

Patrinoj, fratinoj, fianĉinoj estis decidintaj, kiel Barbel, disiĝi de la forirantoj nur je la tutlasta minuto. Tiuj virinoj simpatie sin interekzamenis, reciproka kompato ilin kaptis, kiam ili montris unu al la alia, per rigardo, tiun kiun ili estis perdontaj.

Estis, en la anguloj de la ĉambrego, kuraĝigoj, sopiroj, manoj enplektitaj, rigardoj eniĝantaj profunde unu en la alian. Iafoje, la rekruto, kun tiu krueleco de la estaĵoj tro amataj, ŝajnis senpacienciĝi pro tiuj karesoj kaj apenaŭ aŭskultis la mildajn konsilojn, kaptite de la nerva deziro ebriiĝi kaj bruegi kun tiuj kriaĉantoj, kiuj bande pasis antaŭ la fenestroj.

La lastaj minutoj forflugis. Estis necese disiĝi antaŭ la pordetoj; Barbel kaj aliaj obstinegaj virinoj kuris ĝis la unua fervoja trapasejo. Apogante sin sur la barilo ili vidus la vagonaron preterpasantan. La lokomotivo siblis. La vagonaro ekantaŭeniris kaj alproksimiĝis malrapide, kvazaŭ pene.

— Jen ili! jen ili!

Oni estis ilin amasigintaj en pakvagonoj. Kapoj sin interpremis kontraŭ la pordetoj. Rekonaj krioj kaj alvokoj intermiksiĝis nekomplete superite de la maŝina bruego.

— Frans! Frans!

— Patrino!

Ili rigardis la nigran serpenton malproksimiĝi kaj svingis siajn naztukojn eĉ kiam estis disblovita la fumrubando, kiun la maŝinego post si malvolvis. Ĉio estis finita; ili

rigardis ankoraŭ tiun karnan ŝarĝon, kiun la vagonaro forportis; estis kvazaŭ oni ĵus estus fortranĉinta ĝin, tute vivan, de ĉirkaŭ ilia koro.

## IV.

Reatingante sian vilaĝon, Barbel sin sentis preskaŭ malboniĝanta kontraŭ siaj samuloj: „Ha! pro kio ili ne estis monhavantaj kiel la spicaĵvendistoj de la ‚Ora Napo', kiuj fanfaronis antaŭ la malriĉuloj dirante, ke ili estis reaĉetintaj siajn ses filojn[1])!" Kaj ili ne mensogis.

Por iom skui tiun humoron malmulte saĝan, ŝi provis sin okupi per la mastrumado. Tiun posttagmezon, la sekvintan tagon, la postsekvintan tagon, la laboro estis malbone farita; Barbel vagis kiel vojerariĝinto en la domo. Kaj deziro lin revidi, ega, nekontraŭstarebla, kvazaŭ ekdeziro de graveda virino, ŝin kaptis. Ŝi konvinkiĝis, ke malbone ili estis interbrakiĝintaj, ke ŝi ne estis sufiĉe amema je la adiaŭa momento en la stacidomo. Ŝi fine eĉ riproĉis al si akran vorton, kiun ŝi estis dirinta la tagon antaŭ la foriro kaj la minuton malafablan per tio kaŭzitan meze de ilia korelverŝado. Kaj ŝi estis forgesinta multajn konsilojn! Bonegaj pretekstoj por foriri alvenis al ŝia spirito: li estis kunportinta nur unu ŝtrumpetparon, li troviĝus senmona kaj eble li ne havus sufiĉe da pano!

La sepan tagon, ŝi ne plu povis elteni kaj decidis ĉiaokaze lin reatingi. Li estus ankoraŭ en la depoto, ĉar oni kutime restas tie pli ol unu semajnon, laŭ tio,

---

[1]) Antaŭ la milito ekzistis belga leĝo pri la soldatservo, laŭ kiu ĉiuj dudekjaruloj lotis. Kaj laŭ la trafitaj numeroj oni devis aŭ ne devis soldatservi. Sed tamen tiuj, kiuj estis lotantaj „malbonan" numeron, rajtis ne servi, kondiĉe ke ili pagu mil sescent frankan monsumon por havi anstataŭanton.

kion ŝi sciis. Ŝi rapide faris alian pakaĵon plenŝtopitan per tolaĵoj kaj per manĝaĵoj; poste, ŝi alvokis Rup kaj Dâ, kiuj ludis en la polvo de l' vojo, lavis ilian vizaĝon, vestis ilin en kelkaj minutoj kaj siavice dimanĉe sin vestis.

— Kien ni iros, patrino?

— Al Beveren, retrovi nian Frans!

Ne estus la knaboj, kiuj protestus pri tiu vojaĝo. Nur pripensante la perfervojan promenadon ili saltodancis.

— Jen! — diris la najbarinoj, vidante Barbel ŝlosanta la pordon de sia butiko... — Jen la maljuna Barbel, kiu prenas ripoztagon.

La klaĉulinoj deziregis ŝin demandi, pro kio ŝia dimanĉa ĉapelo, ŝia plej blanka kufo, ŝia bona jupo kaj ŝia nova manteleto? Ŝi, kutime tiel parolema, kontentiĝis disdonante bonajn tagojn kaj rapidis neforlasante la mezon de la ŝoseo.

En Lierre, ili nur havis tempon por aĉeti siajn biletojn. Malafablaj gardistoj helpis tiun trion da novicaj vojaĝantoj eniri en triaklasan vagonon. Estis unuafoje, ke Barbel riskis la nekonataĵon per tiu transportilo. Estis vere, ke Frans estis ĵus montrinta al ŝi la ekzemplon. Vere mirigite, Rup kaj Dâ, la nazon gluitan sur la vitraĵoj, rigardis la pejzaĝon pli rapide kurantan ol la scenoj de iliaj sonĝoj.

La horloĝo de la katedralo de Antverpeno sonis la duan posttagmeze, kiam, post multaj iroj kaj reiroj pro la informrifuzoj de la urbanoj, pro la petolaĵoj de la knabaĉoj kaj pro ĉiaspecaj malhelpaĵoj, la kampulino kaj ŝiaj du idoj fine suriris la transirantan ŝipeton. Tiuj simpluloj neniam antaŭe estis vidintaj la Skeldon! Barbel, tro enprofundiĝinte en siajn patrinecajn revojn, donis al tiu impona verdeta akvego, trakurita de strangaj lignodomoj, nur malprecizan atenton; ŝi nenion rigardis escepte sian penson; kaj tiu apudmara dekoracio, kiu estus iginta

ŝin admiregi alian tagon, estis nun al ŝi indiferenta, eĉ nevidebla. Male, la knaboj falis de ekstazo en ekstazon. Ĉiumomente ili tiris la revemulinon je ŝia manteleto por ke ŝi admiru velon, helicon, mevon sur akvo saltetantan, detalon de la manovro, la bireton de sunbruniĝinta maristo. La sonorilaro ekkantis kaj ili kredis, ke tiu muziko falis el la ĉielo.

Je la alia bordo estis necese reenvagonariĝi.

— Ĉu ni estas alvenintaj en Beveren? — Barbel demandis siajn kunvojaĝantojn, je la unua halto. Ŝi jam opiniis la rapidecon de lokomotivoj nesufiĉa. Ŝiaj pensoj multe plirapide veturis! Fine ili atingis la celon de sia vojaĝo. Senpene ŝi montrigis al si la depoton: vasta konstruaĵo ruĝa, flanke de la urbeto.

Ŝi renkontis rekrutaretojn jam tute ekipitajn, kiujn kaporaloj kondukis kolerblasfemante. Mallertaj, ĝenataj, embarasataj de siaj membroj, ili provpalpis sin ne certaj pro sia propra personeco. Aliaj ŝajnis naive gloraj pro sia nova uniformo.

Korpremate, Barbel provis rekoni sian Frans sub tiuj rondaj ĉapoj ruĝe borderitaj kaj inter tiuj grizaj pantalonoj. Ŝi volis alpaŝi, sed suboficiro flankenpuŝis ŝin. Ŝi rapide returneniris al novaj alvenantoj, ne ankoraŭ loĝantaj en la depoto, kiuj profitis el sia lasta horo libera. Ŝi petis de la malpli moviĝemaj informojn pri Frans. Sed, idiotiĝinte kaj enprofundiĝinte en sia propra prizorgo, tiuj kompatindaj mizeruloj ne aŭskultis aŭ ne komprenis ŝin. Frans Goor? Tiu nomo nenion signifis al ili.

Vere, ili estis same tiom ekstermediaj kiom ŝi en tiu angulo de Flandro. Sendite amase el ĉiuj partoj de la lando, ĵetite tien multnombre, ili ankoraŭ ne havis tempon por aplombiĝi kaj por bone scii, kia estas la destino ilin trafinta. Estis konfuzego de urbanoj kaj de kamparanoj,

de kiteloj de farmservistoj kaj de jakoj de manlaboristoj, de Flandranoj kaj de Valonoj, de boatistoj kaj de terfosistoj. Iliaj senenergiaj koksobalanciĝoj, ilia tumultbruego, iliaj atakoj intermitaj de idiotiĝo kaj de frenezeco estis kaŭzitaj de la febro, kiun travivas birdoj diversplumaj kaj diverslandaj subite kunigitaj en sama kaĝego. Hazarde ili interfratiĝis, alvokis sin reciproke tute ne konante unu la alian, intermanpremis kaj regalis per biero, nemalebligante foriri la sekvintan momenton kaj eniri en alian grupon por improvizi aliajn amikecojn. Ne estis du inter ili, kiuj jam estis antaŭe interrenkontintaj. Kelkaj uniformoj enmiksiĝis en la aregon de rekrutoj per ĉapo kapvestitaj. Ili jam estis ĉirkaŭataj; oni estis tre ĝentilaj al ili, oni aŭskultis ilin kiel oraklojn kaj la plej senĝenaj sin kapvestis per ilia kazerna ĉapeto aŭ tiris ilian sabreton el ĝia ingo.

Fine Barbel sukcesis trabati irejon tra la amasego ĝis la depota kazerno. Ŝi pretiĝis por trairi la pordeton. Gardostaranto malebligis tion al ŝi. Feliĉe li estis filo de l' kampina regiono kaj la kapuĉa manteleto, la vasta kufo kaj la cilindra ĉapelo de la kampulino estis jam bone impresintaj lin, antaŭ ol ŝi estis malferminta sian buŝon. La instrukcio malpermesis al li lasi virinojn eniri en la depoton, sed li proponis interrilatigi la samlandulinon kun la serĉata persono. Kaj, mem ne konante la rekruton el Kessel, li demandis alian soldaton de la depoto, iun Valonon el Mons, senĝenan ĝojulon.

— Frans Goor! — diris ĉi tiu. — Atendu iom. Mi vidis tiun infanterianon. Nigrohara, ŝultrolarĝa, . . . ĉu ne? . . . Vi estas malbonŝanca, patrineto, ĉar li nun veturas plenvapore al Ostende, kie restas garnizone lia regimento.

Barbel travivis intensegan afekcion, sed ne opiniis sin venkita. Kie estas Ostende? Ŝi tuj irus tien!

Pro Dio! Ne estis facile klarigi, kie troviĝas tiu diabla

urbo. Ĉio kion la filoj de la kampina kaj de la borinaĝa[1]) regionoj sciis pri tio, estis, ke ĝi kuŝas sur la bordo de l' maro, tre malproksime, kaj ke plurajn horojn oni bezonas por ĝisiri tiun urbon. Estis eĉ eble, ke ŝi ne atingus ĝin la saman tagon. La lasta vagonaro al Ostende jam estis foririnta, ili kredis. Kaj eĉ se ŝi povus ankoraŭ esti hodiaŭ en Ostende, tio ne estus antaŭ la nokto, longtempe post la nomvokado, kaj tiaokaze ŝi devus loĝi en nekonata urbo kaj atendi la sekvontan tagon por kisi sian „filĉjon".

Ŝi aŭskultis tiujn saĝajn parolojn kiel martiro, kiun torturo pli kruelega ol la aliaj venkos. Dum la vojaĝo, la ideo revidi sian Frans estis subteninta ŝin. Ŝiaj nervoj nun malstreĉiĝis kaj ŝi sin sentis tre laca kaj la pezeco de la pluva posttagmezo kontribuis konsumlacigi ŝin.

Ŝiaj kunparolantoj kompatis vidante ŝin tiom senkuraĝiĝinta.

— Kredu nin, patrineto, — konkludis la gardostaranto, — prokrastu vian viziton ĝis pli malfrue kaj rehejmeniĝu. Post duona horo, vagonaro foriros al Antverpeno. Iom da kuraĝo, oni ne mortigos vian infanon! La soldatservo estas malfacila; sed oni ne mortas pro tio, kiel pruvo, jen ni estas, la kamarado kaj mi, firmaj sur niaj kruroj. Nu!

Kaj levetante la egan pakaĵon, kiun ŝi kunportadis depost la mateno, li proponis al ŝi transsendi ĝin al Frans per soldatoj de lia regimento, kiuj devas morgaŭ foriri.

Cetere, la knaboj, pri kiuj ŝi tute ne atentis, preskaŭ falis pro laciĝo kaj malsato. La soldatoj rimarkigis ŝin pri tio. Depost longe la novaj objektoj ne plu interesis Rup kaj Dâ, kaj ili malbonhumore lasis sin treni. Tio

---

[1]) Borinaĝa (franclingve *borinage*) regiono estas la karboregiono de Belgujo.

decidigis ŝin. Ŝi malligis sian pakaĵon kaj elprenis kelkajn buterpanojn, paron da kuiritaj ovoj por la infanoj kaj devigis la komplezemajn soldatojn akcepti kelkajn el la belaj pomoj destinitaj al sia Frans. Poste, ŝi prenis Rup kaj Dâ sub la baskojn de sia mantelo kaj inversigis siajn paŝojn, post kiam ŝi estis mirigite ĉirkaŭrigardinta la altajn ruĝetajn murojn, kiuj ŝajnis tremi sub la kurado de nuboj grizaj kaj kadavraj kiel gilotina tranĉilego.

## V.

Frans ne estis malkontenta forlasante la depoton. La garnizono estis la nekonataĵo sed ankaŭ la ŝanĝo, kaj ĉiu loĝejo devus esti pli preferinda ol tiu fetora karavanejo, kiu estis la depoto.

Tio, kio estis lin plej malloginta en lia preparo al la militservo, estis la malpureco, kiun antaŭmontris tiu nova reĝimo. Li devis sin kuŝi sur pajlosako, per kiu pluraj aliaj soldatoj estis jam viŝintaj sian korpon plenpolvan kaj ŝvitantan. Nehavante kovrilojn, li dormis tute vestita sur tiu litaĉo. Kaj estis neeble sin lavi matene. Oni rifuzis al ili sapon, kaj eĉ la akvo estis malofta.

Dumtage, li erarvagis senokupe kun siaj kamaradoj, tra la ĉambregoj kaj la kortoj de tiu malliberejo, kaj liaj rigardoj renkontis nur ruĝetajn murojn aŭ kalkblankigitajn pariojn, nigriĝintajn pro malpureco kaj ŝvitantajn pro mucideco. Eĉ ne unu liberhoro! Ili ne plu povis interkomuniki kun la ekstera mondo antaŭ sia kompleta aliiĝo de kampulo en soldaton.

Do, li ellasis senpezigan sopiron trairante la pordeton de la malplaĉa konstruaĵo. Li nur restis du tagojn en Ostende. Oni erare estis sendinta lin tien. Feliĉe la pakaĵo sendita de lia patrino atingis lin precize en la momento, kiam li estis reekvojironta.

Nun Frans estas en Bruselo, en vasta, vastega urbo. Li loĝas kun centoj da aliaj soldataj servutuloj en tre malnova abatejo, ŝima kaj ruiniĝanta, kun muroj salpetritaj kiel tiuj de la stalo, tute plena de ratoj, malbone aliigita en kazernon, apenaŭ sufiĉa por esti uzata kiel magazeno por komercaĵoj.

Tiu malbela barako kvarlatera staras en la centro de labirinto de lepraj stratetoj, konsistantaj unuflanke el la altaj muroj de la kazerno kaj aliflanke el vicoj da domaĉoj destinitaj por malbonfamaj drinkejoj, vendejoj de likvoroj kaj amaĵoj falsitaj. En tiu kvartalo svarmas la plej malriĉaj inter la malriĉuloj.

Lia preparado daŭras. Iom post iom, li ekkonas la regularon. Rekrutinstruanto instruis lin teni la pafilon, marŝi en la korto, kalkuli siajn paŝojn, halti je la ordono „Haltu!", turniĝi sur unu aŭ sur la alia kalkano por obei al la ordono „Flanken!" Kiam li konis tion, oni klarigis al li la manovron per la armilo. Poste, oni sendis lin, dufoje ĉiutage, kun la regimento por la ekzerciĝo, sur ebenaĵon ŝliman aŭ polvan. Ili tie restis dum pluraj horoj vadante aŭ rostiĝante, kaj turnante aŭ manovrante ĉiuflanken.

Ne gravis la militaj promenadoj kaj paradoj. Sed krom tio, oni devis ĉeesti reviziojn, kie oni enuegas dum horoj, la armilon sur la brako; la gardostaradon antaŭ la palacoj aŭ ministrejoj; festojn kaj publikajn cermoniojn, en kiuj la soldatoj figuras nur pro la vantemo de la superuloj kaj pro la distrado de la rigardaĉantoj; centojn da eksterordinaraj deĵoraĵoj aldonitaj al la ĉiutaga sklaveco. La ordono venis, estis necese obei. Senfinaj ĉikanoj, bagatelaj punoj abundis, malgraŭ ilia bonvolo por esti neriproĉinda. La ĉefoj forflugigis siajn kolerojn insultante la soldatojn. Neniu riskus moviĝeti. La milita

punkodo, kiun oni estis leginta antaŭ Frans je lia eniro en la kazernon, rezervis serion da rimedoj tute klaraj kaj precizaj por rememorigi la neobeantojn kaj la sendisciplinulojn pri ilia devo. Oni interrakontis malĝojajn aferojn pri la punrotoj. La sola ideo esti enkarcerigita en fortikaĵo de Antverpeno, aŭ sendita pro la „punkorekto“ timigis la plej malcedemajn. Tie efektiviĝis punoj tiel kruelegaj, ke eĉ la bonvolo mankis al la gardistoj de tiuj malliberejoj. Malgraŭ la allogilo de duobla salajro, la suboficiroj, kvankam malmulte sentokapablaj, rifuzis servi ĉe la „punkorekta taĉmento“. Estis jam puno, esti sendita kiel gardisto al la pioniroj. Por tiuj, kiuj ordonis en tiuj dolorejoj, veraj inklinoj de ekzekutisto estis necesaj.

Frans uzis siajn libermomentojn en la kazerno, antaŭ la enlitiĝo, oleante sian pafilon, frotbriligante la butonojn de sia uniformo; malofte li malfruiĝis en la kantino, preferante konservi siajn kelkajn cendojn por la forpermesaj horoj. Laciĝinte pro frotegado kaj purigado de siaj vestaĵoj, li etendis sin tute vestita sur la lito kaj atendis la nomvokadon. La oficiro kaj la suboficiro deĵorantaj eniris. „Laŭ Ordono!“ Ĉiu sin lokis ĉe la piedkolono de sia lito. La laŭvica nomvokado komencis. La „ĉeestas“, diverse modulitaj, eliĝis ĝis kiam la listo estis elĉerpita. Kiam la vespersignalo estis sonorigita aŭ tamburita, la lumoj estingiĝis.

La unuajn noktojn Frans ne dormis. Cetere ĝis meznokto, oni bruegis kaj oni amuziĝis per malĉastaj farsoj, per trafaj ludoj kaj per fanfaronado de malvirtaj kolegianoj. La senbruajn tagojn, oni petis fabelon malprudan aŭ tragedian de la spritulo de l' roto. Laŭmezure, ke la rakonto alfiniĝis, la nombro de la aŭskultantoj malpliiĝis. Al la *krik*, per kiuj la rakontanto punktis sian eldiraĵon

por kontroli la atenton de la ĉeestantaro, respondis *krak* pli kaj pli malmultaj. Estas kutimo de ĉiuj plenĉambroj, en la aziloj por almozpetantoj tute kiel en la punaj lernejoj.

Kiam la dormo estis fine renversinta sur la pajlosakon la ŝercemulojn kaj la rakontantojn, fariĝis silenta intertempo, dum kiu Frans nur aŭdis la spiradojn kontraŭritme miksiĝantajn. Kaj se li ne estus tiam ekdorminta, li tre riskus ne fermi la okulojn, ĉar, iom post iom, la dormejo eniris en alian bruegan periodon.

Ronkoj leviĝis. Kaj laŭmezure, ke la ŝonĝoj vizitis la dormantojn, aŭdiĝis sopiroj, ridoj kaj balbutoj. De unu al alia angulo de la ĉambro, somnambuloj kvazaŭ sin interalvokis kaj interdisputis. Kiam lunbrilis, Frans observis la mirigan esprimon de tiuj estaĵoj, iliajn strangajn teniĝojn, iliajn vizaĝojn grimacantajn aŭ konsternatajn, iliajn membrojn agitiĝantajn. Unu ridetis, sonĝis pri la hejmo kaj la hejmlando, balbutis per infana voĉo amatajn nomojn. En alia angulo eksplodis krioj, blasfemoj, ploregoj. Sonĝanto duone leviĝis, svingis la brakojn, murmuris kelkajn nekompreneblajn vortojn kun akcento stranga kaj poste refalis kiel mortinto. Frans vidis krurojn fortege antaŭjetiĝantajn el sub la tukoj, pugnojn fermegitajn, minacantaj la nevideblan turmentanton. La plej malkvietigaj estis stertoroj pro amo, sopiroj de premito, kisoj en la aero, svenoj provokitaj de fantomoj. Frans retenis sian spiradon, sin sentis tremi pro abomeno kaj pro kompato. Vintre, oni spiris malfacile, ĉar la atmosfero estis naŭza; sed somere, la haladzoj de tiu homa amasiĝo malbonodoregis kaj duonsvenigis kiel elspiraĵoj de kreskaĵoj tro ebriigaj.

Ofte li estis vekita de ebriulo blasfemanta kaj ŝancelpaŝanta aŭ de forpermesulo revenanta el libertempo,

kiu estis trompinta la severecon de la gardistaro kaj kiu lasis *sin fali* sur kelkajn litojn antaŭ ol atingi la sian. Krom tio estis inspekto de la deĵoranta oficiro; la fasko da radioj de la kovrebla lanterno, direktita de vizaĝo al vizaĝo, fortiris lin momenton el la dormo, kaj la okuloj malfermegitaj refermiĝis antaŭ ol la patrolo estis elirinta.

Se la kazerno, tiu miksaĵo de homoj diversregionaj, laŭ la hazardo de la rekrutigado estas ĝenerale konsterniga por la individuo, ĝi estas speciale abomeninda por la kamparanoj, kies moroj estas pli malmoviĝemaj ol tiuj de la urbaj aŭ de la industriaj centroj. Tiuj, kiuj jam vivis en la grandaj fabrikejoj, estas kutimiĝintaj al speco de miksiteco senĉesa kaj ankaŭ al kvazaŭa disciplino. Ilia libera volo, ilia iniciatemo jam estas malfortiĝintaj.

Sed inter ĉiuj kamparanoj la plej kompatindaj certe estas tiuj, kiuj venas el la flandraj regionoj. Unue, ilia lingvo ne estas tiu de la instrukciado kaj de la ordonoj. En la belga armeo, ĉio fariĝas laŭ la franca modo. El tio rezultas, ke la Valonoj montras, depost sia ekservo, aplombon kaj memfidon, en kiuj iliaj instruantoj preskaŭ rimarkas intelektan superecon rilate al aliaj kamaradoj de la alia raso. Troe oni emas konsideri kiel stultecon la melankolion, la miregiĝon de tiuj grandaj nostalgiemuloj, silentemaj kaj revemaj kiel la plimulto de ili, kaj sin lasas imponi de la fluegaj paroladoj de la klaĉuloj, de la burleskaĵoj de urbanoj kaj de ŝercemuloj. La flandrajn kamparanojn trafas la plej egaj insultoj kaj turmentoj. La suboficiroj ne kontentiĝas malkaresante, sed eĉ taŭzas tiujn mirkonsternitajn krudulojn, ĝis kiam ili ne plu kapablas distingi inter dekstre kaj maldekstre. Kuraĝigite de iliaj ĉefoj, la soldatoj siavice mokas la rekrutojn el la kamparo. Longtempe tiuj kamparanoj estas la ŝercitoj de l' plenĉambro. Poste oni miras pro ilia bonkompreno, ilia

memoro, pro la servo korekta kaj serioza, kiun ili plenumas, sen troa fervoro, sen bruo, sed kun inteligenteco kaj kun reguleco. La mokantoj tiam ne plu amuziĝas, aŭ, hontigite en sia supraĵa merito, ili surde ekmalamas tiujn estaĵojn kvietajn kaj profundajn. Dum siaj malfeliĉoj, pli ol unu filo de l' kampina regiono, komparante sian sorton kun tiu de la bovinoj kaj de la ŝafoj, kiujn li gardis, ne hezitas envii siajn stalbestojn.

Frans, kiel ĉiuj aliaj, devis suferi tiujn turmentojn. Tamen, pli elturniĝema, li pli facile komprenis la funkciilaron de l' servo. Oni havis kontraŭ li malfavoron tiel kruelan kiel kontraŭ la aliaj knaboj venintaj el la Nordo, sed oni pli respektis lin; oni kontentiĝis insulti lin malantaŭ li en idiomo, kiun li ne konis: „*Tiesse de flamin*! *Flamin de mesc*. .![1])

Frans havis la flegman gajemon de l' Flandrano, tiel rapide ofendita en alia medio ol la sia. Li, la ĝojo de la domo de Kessel koleriĝis kontraŭ tiuj cinikuloj. Kelkaj provis favorigi lin al si. La speco de korelverŝo, de maldelikata familiareco de tiuj „bonaj knaboj“ malplaĉegis al li. Nete li rifuzis iliajn proponojn, li ne volis kanajliĝi inter ili kaj neniam li rezignis sian individuecon en amikeco malaltiga.

Kvankam sola el sia vilaĝo en sia roto, li trovis feliĉe en la bataliono kaj en la aliaj regimentoj de la garnizono kelkajn samregionanojn kaj aliajn honestulojn kiel li, suferantajn pro sia miksiteco kun la aĉularo de la urboj kaj de la grandaj vojoj, la sentaŭguloj, la mallaboremuloj, la vaguloj, la kolportistoj.

---

[1]) Insultoj, kiujn Valonoj ofte esprimas kontraŭ la Flandranoj. Ilia laŭvorta signifo estas: „Flandraĉa kapo! Flandranaĉo de miaj testikoj!“

En la strato, kiam, observinte sian ĉirkaŭantaron, Frans enpensiĝis, li travivis malkvietecon. Estas ĉar en ĉiuj tiuj vagantoj per uniformo vestitaj, li retrovis la saman karakteron malageman kaj eksterkutiman. Li ankaŭ devis havi en la okuloj tiun esprimon de besto enkaĝigita, malproksima el sia lando. Ĉe ĉiuj soldatoj, li konstatis agmanieron imiteman kaj malaltigan.

Ĉiuj montris ion mallertan, humilan, hontan. Instinkte ili duonkaŝis sin kaj cedis la trotuaron al la civiluloj. Ili ne portis la uniformon de la militisto sed la livreon de la pariao. Anstataŭ reprezenti armeon, eldeveni el la patriotismo de popolo, enkarnigi la plej bonan el ĝia sango kaj el ĝia juneco, ili konsciis pri sia rolo de dungita soldato.

Ĉie oni konsideris ilin kiel forĵetindaĵon, kiel kostegon, kiel mallaboremulojn. Dum kvieta tempo, oni preskaŭ maldistingis tiujn soldatojn de neŭtrala lando el la mizeruloj helpataj de la publika filantropio, kun la gastoj de la orfejoj kaj de la maljunulejoj. „Senutilaj buŝoj! kiujn la ŝtato vere malprave subtenas, kaj kiuj sin nutras per la mono de la impostpagantoj“, dekretis la abomeninda gentaĉo de la satuloj. Tio ne malebligis al la burĝoj kredi, ke je la strikotagoj, tiuj infanoj de l' proletariaro, devige rekrutigitaj, tiuj kontraŭvolaj soldatoj pafus al siaj fratoj de la minejoj kaj de la laborejoj. Aŭ se ili iom dubis pri tio, ili ankoraŭ pli malfide kaj pli venĝeme konsideris ilin. Feliĉe oni nur malofte sin turnis al tiuj malfeliĉuloj! Estus tro riskeme oftigi tiun kontraŭnaturan eksperimenton.

Vere, tiuj soldatoj manĝis la panon de oligarĥio, kun sentoj egoismaj kaj vulgaraj. Kiel postuli de ili la civitanan virton kaj heroan spiriton, kiuj tute mankis al iliaj ekspluatantoj? La abomenindega anomalio de tia armeo en nacio libera plidaŭris malgraŭ la krio, kiu leviĝis el la

klasoj vunditaj kaj minacis eterniĝi malgraŭ la admonoj de la potencaj najbaroj.

Se, pro aventuro, interbatiĝo okazis inter soldatoj kaj civiluloj, estis ĉiam la soldato, kiu malpravis. Ne ekzistis heroa legendo por fierigi ilin, por kunligi ilin al ilia standardo. Male, ĉirkaŭ ili, la privilegiuloj ne kaŝis sian skeptikecon en tiu afero; la feliĉuloj eĉ ne almozdonis iluzion al ili pri la senkreditigo kaj la malnoblegeco de ilia profesio.

Kvankam ne rezonante tiel flegme la kaŭzojn de tiu malegala situacio, Frans, tre impresebla, konsciis pri ili. En la vilaĝo, neniam li estis korsuferinta pro tiaspecaj insultegoj. Nun li legis, eble ne malamikecon, sed almenaŭ humiligan indulgon en la okuloj de la elegante vestitaj pasantoj. Ĉie estis netolereblaj mienoj de protekto kaj de supereco. Kiam li eniris kafejon de filistroj vizitatan, li sin sentis entruda, malkonvena, nur pro la maniero, per kiu la klientoj rigardis lin kaj per kiu la kelnero akceptis lian mendon. Antipatia fluido forkurigis lin, travivanta revoltojn; sed li konsciis pri sia malforteco antaŭ la interligo de la feliĉaj kastoj.

## VI.

La dimanĉoj! Li konis tiujn dimanĉojn, dum kiuj la soldato sencele trairas ĉiujn stratojn de la urbo, dum kiuj li trenas la piedojn en senfinaj promenadoj! — la gapadoj ĉirkaŭ stratvendisto, la haltoj antaŭ la montraj fenestroj, la izoleco en indiferenta homamaso, la laŭhazardaj renkontoj de kamaradoj, la ielaj vagadoj. La tagojn, kiuj sekvis pagon aŭ novaĵojn el la lando, kelkaj rondregaloj en drinkejoj, unu aŭ du dancoj en varietejo. Dum la pluvaj tagoj, la deviga promeno en la Galerioj

St. Hubert[1]). Plivole ol reenkazerniĝi por manĝi, li vespermanĝis, laŭsezone, per plenmano da ĉerizoj, da juglandoj aŭ da maronoj. Enuo anstataŭ alia enuo, plibone estis enui en la libera aero.

Dum sunobrilo, estas ekskursoj en la ĉirkaŭurbo, laŭ vojetoj per alnejoj borderitaj, laŭlonge de la herbejoj kaj de la kampoj. Tiu viva aero, saturita de parfumo, stimulas la sopiron al la hejmo. Negrave: tiu turmento estas bonfaranta, ĉar ĝi memorigas al la soldatoj vivon pli fieran. La paŝoj malrapidiĝas, oni sidas sur la bordo de fosaĵo; oni subakvigas la ranojn sub la nimfeojn, kaj tranĉante vergetojn oni ekfajfas kanton de tie. Poste, je la krepusko, oni reeniras en la antaŭurbon. La gurdoj kaj la kermessalvadoj postulas la senokupajn patrolojn. La uniformoj multkolorigas per akraj tonoj la nigran dimanĉvestaron de la promenantoj. La soldatoj haltas kaj senmoviĝas en rigideco ebria kaj laca antaŭ la stabloj, kaj rigardadas kun la buŝo malfermegita, je la oleolampoj pikantaj la duonombron de la markezoj, kaj rikanas pro la piedbatoj, kiujn ricevas la arlekeno kaj aprobas, balancante la kapon kaj sin antaŭenpuŝante, la humoraĵojn de la logpatosoj kaj nenion interdiras, ĝis kiam unu aŭ alia inter ili, estante elĉarmiĝinta, skuas la kamaradojn, kiuj tiam ĉiuj „ekfunkcias“ kaj lin maŝine sekvas, por lasi sin hipnotizi pli malproksime.

Estas necese reenkazerniĝi. Kaj eĉ rapidpaŝe! Amase, balancante la brakojn, ŝvitegante, ili kuregas sovaĝe, kolerante, nur ellasante blasfemojn. Kompatinda estus la filistro, kiu intencus nun reteni ilin! Ili atingas la kazernan regionon, malbonfaman, aĉe pavimitan, malsekan kaj putriĝan, kie suspektindaj elvaporiĝoj vualas per flaveta

[1]) Strata trairejo, vitre kovrita.

krepo la lanternaĉojn. La nomvokado, pro Dio ...! En la malproksimeco, la tamburo murmuras minacojn aŭ la klariono rafinas sian longedaŭran plendon kaj ŝajnas antaŭlamenti pri la sorto de la neĉeestantoj. Kaj el ĉiujurbaj strataĉoj kunversiĝas al la ĉefa vojo prokrastuloj, ebriuloj subtenataj de hardeguloj; kaj la vojbordaj domaĉoj elĵetas bandojn de malfruiĝintoj, malbone rearanĝitaj, kiuj bukfermas sian glavrimenon kaj alkroĉas sian bajoneton blasfemante; ĉiuj estas maltrankvilegaj, ĉar ili nepre devas respondi je la alvoko de sia nomo, antaŭ ol la fenestroj de la dormejoj estas estingintaj siajn karbetojn ĉe la supro de la mallumaj muregoj.

Je sia alveno en la regimento, Frans ne konis ankoraŭ la virinon. Somere, je la kermesoj kaj vintre, je la vilaĝaj kunvenoj, li ofte estis dancinta kun Wanske, la filino de Ĵermis, la ĉarfaristo-drinkejmastro. La lastan fojon, ili plenbuŝe estis interkisintaj sin kaj, por uzi la flandran esprimon, li estis ŝin streĉe „preminta kontraŭ sia veŝto", travivante senfinan mildecon je tiu kontakto. La okazo ne estis ebliginta lin iri pluen kaj li certe nenion estis farinta por anstataŭi la okazon. Vere, plezure li vidis la blondan Wanske kaj petole turmentetis ŝin; sed kiam la balo estis fininta, relaborante li ne plu pripensis tion. Barbel daŭris konsideri lin kiel infanon, kaptite de ia timo kaj eĉ de ia ĵaluzo al tiuj, kiujn li elektus. La patrino memoris pri la kaŭzoj de la trofrua morto de Frerik Goor kaj tre timis pro sia filo amojn avidajn. Do, kiam li foriris, ŝi insiste estis antaŭzorge avertinta lin kontraŭ la logegulinoj de la urboj elŝuĉantaj la plensukajn virojn.

La unuan tagon, kiam Frans kaj la aliaj milicianoj de sia klaso permeseliris per sia uniformo vestitaj, la „malnovaj" — al kiuj ili pagis sian bonan akcepton —, estante

tre ruĝegaj, dum la drinkado trudis ilin konfesi ilian ĉastecon kaj ilin fortiris poste al la kvartalo de la porsoldataj virinoj. Laŭnecese antaŭ ebriigitaj, ekscititaj per ĉiuspecaj priskriboj paradizaj, tiuj kamparaj rekrutoj, fianĉoj novicaj kaj kredantaj, antaŭinstruitaj de sia pastro aŭ, kiel Frans, de sia patrino, sekvis siajn konsilantojn, ne senhezite, kantis por aplombiĝi kaj ridis malsincere iom timemaj, ruĝaj ĝis malantaŭ la oreloj. Iliaj gvidantoj, anstataŭantaj soldatoj sennaivigitaj depost la infanaĝo, servantoj konstantaj, sed ne senprofitemaj de la prostituitinoj, ilin puŝis en la malbonfamegan domaĉon troe lumigitan, kaj, plengloraj kiel certe estis la pastroj de Venuso kiam ili oferis unuaĵojn virecajn al la diino, kriegis: „Frandaĵon, belulinoj! Kiu volas virgulojn?“

Kiam ili eliĝis el la brakoj de tiuj virinoj, banalaj sed lertaj kiel meĥanismo, ili estis malprofanigitaj, kaj la volontulo, kiu estis kondukinta la ekspedicion, batis familiare la ŝultron de la knabo de Kessel, dirante al li:

— Ci estas nun vera Belgo!

Frans ne respondis. Li do konis la „amon“ aŭ almenaŭ tion, kion la soldatoj ornamas per tiu nomo, sed reveme, li daŭris deziri la „virinon“. Kaj depost tiam li amis Wanske, la filinon de la ĉarofaristo kaj je la sekvinta kermeso, kiam li akiris novan forpermeson, la bonsana knabino — malgraŭ ĉiuj siaj kontraŭstaroj, en la apuddoma ĝardeneto malantaŭ la lignejo — ekkonis novan Frans. Tio estis ja la vera komenco de la kruda virulo.

Tamen li reiris al la granda numero,[1]) sed nur malofte, pro bezono, fermante la okulojn kaj pensante al la kara forestantino. Poste tio havigis al li eternan

[1]) La domoj sin anoncantaj kiel bordeloj estas signataj per granda stratnumero.

abomenenon. Iafoje, sekve de la korpaj vizitoj, kiuj tiel ege estis lin unuafoje hontigintaj, sed kies urĝan necesecon li estis tuj komprenonta — ho ve! — pro erarigaj simptomoj, la kuracisto tuj kondukigis lin al la hospitalo, kie oni malŝate lin lokis en la kvartalon destinitan por la kuracado de la hontindaj malsanoj. Li ne estis trafita kaj oni liberigis lin. Sed la horoj, kiujn li travivis en tiu geheno, sufiĉis por forpeli lin por ĉiam de la vendistinoj de plezuro. Li konservis la vizion de abomenindaj spektakloj, de nepriskribeblaj suferoj, kies imito eĉ terurigas la vizitanton de anatomia muzeo. Li estis ĉeestinta operaciojn senesperajn. Homoj samaĝaj, samlandaj, samkredantaj estis tranĉataj kaj turmentataj antaŭ liaj okuloj. Ho! la krioj kaj la grimacoj de tiuj inferpunitoj! Estis feliĉe, se ili eliris nur mallaŭdegataj publike, se ili ne estis perdintaj por ĉiam la fianĉinon lasitan en la vilaĝo, se ili ne estis kondamnitaj al disputriĝo.

Konsekvence Frans pli ofte revenis al Kessel. Cetere, li ĵus fianĉinigis sian blondan kaj freŝan grasetulinon kaj li atendis nur la finiĝon de sia militservo por ŝin edzinigi kaj forgesi kun ŝi, iom post iom, la premsonĝojn de sia soldatvivo.

Por paciencigi lin, lia patrino venis lin viziti kelkfoje kun la bona knabino. Estis tiam tagoj de raveco, de klaĉaĵoj, kiam la koroj elverŝegas, de silentoj pli eksteriĝemaj.

Kaj Frans pro tio preskaŭ ŝatis la kvartalon de la Norda Stacio.

La ŝoseo al Antverpeno ĉiam festaspektanta kun sia fizionomio vere flandra; Laeken kun sia reĝa parko kie, sub la altkreskaj arboj, la grandaj grenadistoj de la gvardio enuegas, kun siaj kapoj de infano pufvanga kaj

senruza, tiel maltrafe faritaj por esti vestataj per la impona plusôĉapo de la soldata livreo; ilia mieno kvietema kaj rezignaciema, kontrastanta kun la ekipaĵo militema, kaj al kiuj la vento enfolia parolas milde pri la arboj de iliaj vilaĝoj; — la kanalo al Willebroeck kaj ĝiaj nigraj platŝipoj, trenataj al la Skeldo aŭ kiuj estas ĵus trairintaj, portataj de la granda riverego naskiĝa, la amatajn ebenaĵojn de la antverpena regiono, — fariĝis la celo de lia promenado kun la du virinoj, tuj kiam li estis ilin preninta de la stacidomo kaj regalinta, en unu el tiuj apudaj keletoj, vizitataj nur de la kamparanoj kaj de soldatoj, per duona litro da *Faro*[1]). Ĉar, ĉu laŭirante daŭre tiun vojon oni ne atingus la hejmon?

La sekvintan dimanĉon, li refaris la saman promenadon memorante pri ilia lasta vizito. Estante kuraĝega marŝanto, li eĉ iris pli malproksimen tiam. Iun posttagmezon, li daŭrigis sian promenadon ĝis la „Tri Fontanoj“. Sed estante preterpasinta la kluzon, kiam li oblikviris maldekstren, laŭ la kanalo, li ekvidis, precize antaŭ si, malheliganta la horizonton per sia maso malgracila kaj peza, grandegan konstruaĵon ŝmiritan per flava okro kaj truita per sennombraj fenestroj, mallarĝaj kiel embrazuroj. Ĝi estis eĉ pli malbelega ol kazerno, pli malvarma, pli malviglega, kun reguleco ankoraŭ pli malpardonema, kun senfineco pli ĝenanta. Ĝi insultegis la ĉirkaŭantan kamparon, malpurigis la lazuron de l' ĉielo, provokis la bonan aeron, la verdan spacon, plenan je kantoj de birdoj kaj de boatistoj, je ridoj de drinkantoj kaj de amantoj alatabliĝintaj sub la laŭboj; ĝi estis minaco al la vivo, profano al la naturo. Ĝi estis la soldata punlaborejo: la malliberejo de Vilvorde.

---

[1]) Brusela biero.

Frans ne plu faris paŝon antaŭen, la koron prematan, la bruston malkvietan, la spiron interrompitan. La funebra konstruaĵo ŝajnis bari la vojon al la kampina flanko de l' horizonto. Senfortiĝinte, neesprimeble konsternita, li returniris en la paco de l' krepusko vibranta kaj balzama. Li vane turnis al ĝi la dorson, memoris pri ĉio, kion li amis, alvokis helpe la konsolantajn pensojn trudemajn, revis pri la baldaŭa liberiĝo, pri Wanske, pri Barbel: la *ŝtonfantomo* stariĝis ĉiam antaŭ li.

## VII.

La tagoj forpasas, tre malrapide, sed tamen ili forpasas! La dato de la liberigo siavice alvenos. Frans, pli kaj pli senpacienciĝante, revenas ĉiufoje pli malgaja el siaj libertempoj, li kunportas el ili provizojn da memoraĵoj, da bedaŭroj, da antaŭtimoj, da deziroj, returnadataj en la spirito, dum la longaj horoj de gardostaro. Hejmveo! nekuracebla malsano!

Antaŭ kelkaj tagoj, sufiĉis marŝario ludata de la muzikistaro de lia regimento, por plej ege ŝveligi lian koron, ĉar tiun melodion viglan, sed malĝojigan li aŭdis lastfoje en *l' Etrille*[1]), ĉe Wanske, je la provripeto de la trumpetistaro de Kessel.

Frans Goor ne estas senpune el la sugestia kaj kredanta lando, kie la dikeco kaj la laŭaspekta rigideco de la eksteraĵo kaŝas animojn ĝis la fanatikeco ardajn. Kiom da fojoj, la juna laboristo kantetis tiun rekantaĵon antaŭ sia stablo. En la vilaĝo ĉiuj ĝin kantis. La kamparano ĝin fajfetis aŭtomate paŝante malantaŭ sia plugilo. La fojnisto, sidanta en ĉaro, taktis ĝin interfrapetante siajn lignoŝuojn. Wanske, la filino de la ĉaristo, ĝin mur-

[1]) Nomo de trinkejo, kies traduko estas „Striglilo“.

muretis purigante siajn glasojn. Frans aŭdis ĝin je la lasta kermeso kaj per ĝi oni malfermis la balon. Estas la ario, kiun oni kantas senkonscie, por aplombiĝi, kiu lulas la revadon, kiel la odoro de la floro deŝirita ĉe la vojbordo, kaj kies trunketon pro senokupeco oni duonmaĉas. Rekantaĵo estras vin kiel incitema demono. Ĝi estas la plej ordona resumo de la ĉefaj momentoj de l' vivo.

Al Frans, tiu gaja ario rememorigis pri la kara kaj milda eriko, pri la akra odoro de la juniperoj, pri la murmureto de la abeloj en la stipoj, pri la susurado de la filikoj, pri la herbfreŝeco je la ektagiĝo, pri la brulitaj herbejoj, kaj precipe kaj ĉiam, pri la kufo kaj la vizaĝo de la patrino kaj samtempe pri la dikaj vangoj de Wanske, la filino de la ĉarfaristo.

Li estus volinta rakonti siajn pensojn en la leteroj regule senditaj al Kessel. Al kiom da kontraŭdiraj influoj li obeis; kiom da alternativoj de konfideco kaj de maltrankvileco li travivis! Kiom da sentoj preterflugantaj kaj subtilaj, da aĵoj antaŭsentitaj, pri kiuj li ne konsciis kaj kiuj lin malĝojigis! La korŝira konsolo de liaj atendhoroj!

Tuj kiam li ekskribis al Barbel, ĉiuj liaj impresoj forŝoviĝis, restis nur al la bonkora knabo, sin enfermi en tiuj banalaj formoj, en tiuj frazoj naivaj kaj ĉiame samaj, kiujn oni retrovus, de kvindek jaroj kaj eĉ antaŭe, en ĉiuj soldataj leteroj.

Sama komenco, sama fino: „Mi prenas la plumingon por vin informi pri mia bona sano kaj esperas, ke vi ankaŭ bone fartas . . . Sendu al mi iom da mono, ĉar ne estas agrable vivi tie ĉi . . .“

Sed negravas tiu ŝajniga senmildeco de la frazo; la forestantoj komprenas kaj divenas. Ofte larmo, malbone

sekigita, kaj kiu falinte sur la inkon faris makulon, diras plimulte al tiuj simpluloj pri la nostalgio de l' soldato.

Tamen, nefarante kiel aliaj, Frans ne tedis la siulojn per monpetoj. Nevolante ekspluati sian patrinon, trompeti ŝin pretekstante, kiel estas kutimo en la regimento, malsanojn, monpunojn, vestaĵojn perditajn aŭ portitajn ĉe la garantipruntisto kaj kiujn oni devis repreni aŭ anstataŭigi, se oni ne volis esti juĝota de la milita juĝantaro, la bonkora knabo sukcesis ne nur ŝpari el sia rezervita sumo por la vestaĵoj, sed ankaŭ el sia soldata salajro. Okaze li faris kelkajn komplezojn al iu filo de bona familio propravole soldatiĝinta pro momenta malsaĝaĵo, kaj tiu „aristokrato" lin pagis malavare. Li oferis tiun monon al Barbel kaj ŝi ĉiam denove koleriĝis pro tio, ĉar ŝi volis, ke li konservu parton de tiu mono por amuziĝi.

Unufoje, la unuan monaton de lia restado en Bruselo, li estis ĵetinta la monon tra la fenestroj; estante bela soldato, li cedis je la koketeco sin fotografigi malmultkoste en sia uniformo brile freŝa. La portreto sendita al Kessel, enprofundigis en la ekstazon Barbel, Wanske, la infanojn kaj la tutan paroĥanaron.

Staranta, bone frotbriligita, gantvestita, la aspekton viglegan, la botojn sur tapiŝo kun desegnaĵoj, kun kurteno malantaŭ li, la dekstran manon apoganta sur seĝarkaĵo, la maldekstran tenanta la manŝirmilon de la sabreto, la dimanĉan ĉakon metitan sur skulptita tablo. Frans similis baronon, Barbel preskaŭ dankis Dion, ĉar li estis lokinta ŝian idon en tiun belan ĉambron. Bone, jen io plivaloranta ol la depoto! Kaj la bonanimulino devis konservi ĝis sia unua vojaĝo al Bruselo tiun iluzion pri la parada lukso ĉirkaŭanta la soldaton en la kazerno.

Kuraĝon, soldato! Post kelkaj monatoj ci estos libera.

Alia ol ci estus kutimiĝinta je la kazerna vivo. Tial, ci ne plu suferos pri la malkomplezemo de cia kunvivantaro. Preskaŭ ĉiuj ciaj kamaradoj finfine cin estimas. Kiam la punoj abundis kaj kiam ci estis „kaptita inter la amaso“ pro peketoj faritaj de aliaj, neniam ci protestis, tro fiera por plendi, tro lojala por agi kiel fidenuncisto aŭ eĉ por postuli, ke la kulpuloj sin konigu. Ci suferis, en tiaj cirkonstancoj, la punĉambron, eĉ la karceron. De tiam, ciaj samranguloj vidis, ke ci estas energia kaj ke tiu silentemulo malmulte komunikema estas kuraĝulo, bona diablo maltimema.

Ciaj ĉefoj ankaŭ cin ŝatas. Eĉ ili proponis al ci la rangogalonojn de suboficiro, kondiĉe ke ci subskribu kontrakton. Neniam! Ci eĉ ne akceptus oficiran titolon! Ci nur havas unu solan deziron: foriri plej baldaŭ.

Kelkaj monatoj! . . . kelkaj semajnoj! . . . kelkaj tagoj!

Ha! malbonŝanca soldato, tro senpacienca. Atentu, ci tentas la malfeliĉon. Ci montras cian ĝojon. La homoj ne ŝatas tiun vantomontradon. Unue ci ĵaluzigis kontraŭ ci. Tiujn rangogalonojn kiujn ci rifuzis, alia akceptis, kaj pro kontraŭeco tro ofte en la homa karaktero, tiu alia, kiu devus cin danki pro cia rifuzo, estas ofende malfierigita kaj koleradas, ĉar li estis malpli malŝatema ol ci. Cetere neniam, por uzi lian parolmanieron, „li povis cin toleri“. Ekzistis unue, inter vi rasa antipatio, poste, karaktera neakordigebleco. Li estis malbona helplaboristo de la industria regiono, laboristaĉo de ĉie forsendita; krom tio, paradema kaj fanfarona, kutima drinkogasto parolema. Fine propravole li soldatiĝis. Ĉiam oni estas taŭga por esti soldato. En tiu mondo, lia parolabundeco estis ŝatata; per siaj burleskaĵoj li favorigis al si la kapitanon.

Nemontrante alian antipation, Frans nur evitis tiun

fiulon. Sed tiu homspeco ne ŝatas esti nerimarkata. Ĝi volas, spite de ĉio, kamaradiĝi kun la „*Flamin*“ eĉ se nur estus pro vantemo, pro fanfarono, dirante, ke ĝi estas venkinta la fierecon de tiu malafablulo kaj por krii malŝate, post kelkaj diboĉoj kune faritaj: „Vi scias: tiu flandra krudulo ne estas maloftaĵo; oni eĉ dirus, ke li estas kanajlo, ho la, la!“

Ci, Frans, preferas ignori tiujn homojn, kiujn ci malŝatas. Do, ĉiuj proponoj de tiuj soldataĉoj estis vanaj; ci respondis kun distrema tono al iliaj humoraĵoj. Enpensiĝante en tiun kampinan revon ci ne pli zorgis pri tiu „sentaŭgulo“ ol pri muŝo; kaj estas animoj kiel la cia fermitaj, ciaj samlandanoj, kruduloj, bestaĉoj, — kiel ilin nomas la triviala ŝercema *Haulqueur*[1]) — kiujn ci deziras kaj kies voĉon ci amas. Ha! li ne pardonis cin! Tiu esploremulo havas malamon de koketulino.

Lia kontrakto nur finiĝos post kelkaj jaroj. Krom tio, li por ĉiam adiaŭdiris sian naskiĝan provincon. Vivu la armeo! Li do dankeme akceptis la rangon, kiun ci rifuzis. Atentu! li nun estas cia ĉefo.

Sed nur por tri tagoj.

Frans ĵus skribis al sia patrino. En sia ĝojego, li eĉ trovis aliajn vortojn anstataŭ la ordinaran formulon de siaj leteroj.

„Patrino, lastfoje mi prenas la plumingon por cin informi pri mia bonfarto. Post tri tagoj mi venos informiĝi pri la cia. Tri tagoj, sepdekdu horoj, kvarmil tricentdudek minutoj . . .“

Li skribis tiujn minutojn per streko sur paĝo, kaj estas vera feliĉo ilin forstreki laŭvice. Kiam li finas sian leteron, nur restas kvarmil tricentdekkvin. Kaj ĝoje li forigas tiujn mortintojn.

[1]) Estas la nomo de suboficiro.

La klariono aŭdiĝis. Kio okazas? Eksterordinara nomvokado.

La serĝento *Haulqueur* sin montras antaŭ la viroj starantaj en la korto kaj per voĉo raŭkiĝinta kaj kria:

— Pretiĝu! Rektiĝo dekstren ... Numeroj du, tri, eniru ... Numero sep, elpaŝu ... Malfermu la vicojn ...

La soldatoj obeas aŭtomate laŭ ordo tenante la pafilon.

— Bone. Oni ŝtelis mian monujon, kiu enhavas tri frankojn. Ĉu iu el vi konas la ŝtelinton? Evidente la ŝtelisto estas tie ĉi kaj li ne sin denuncos. Estus tamen multe pli bone por li, per D...! ... Neniu vorton diras ... Tiam, dum vi estas tie ĉi, mi vizitos la sakojn kaj la pakaĵojn ... Sed unue ni plenumu etan inspekton senperan ... Numeroj unu, du, tri inversigu viajn poŝojn.

La nomitoj obeis tiun ordonon. Poste, aliaj siavice decidiĝas. Ili eltiras el siaj poŝetoj nur pipojn, tabakopolvon, grasmakulitan leteron, kelkfoje iom da kupraj moneroj, kvadrate strekitajn naztukojn.

— He, vi, numero naŭ, la Flandranaĉo! Frans Kaniverston[1]), ĉu ci aŭdas min. Malplenigu ciajn poŝojn, kaj rapide ...

La malfeliĉa knabo estis spirite tre malproksime de la teatro, kie sin ludis tiu malaltiga komedio. Li konjekte kalkulis la minutojn forflugantajn admire rigardante, antaŭ si, la havenon, la kajon, preskaŭ atingatan. Li ne aŭdis la alparolon de la cinikulo.

— Tondro de Dio! Ne estas tamen la oreloj, kiuj mankas al tiu pendigindulo! Ĉu ci fine komprenis.

La soldatoj ridas por favorigi al si la serĝenton.

---

[1]) La Valonoj ofte uzas tiun esprimon por moki la Flandranojn. Estas ĉar ĉi lastaj, nekompreninte iun ordonon, respondas kutime per frazo preskaŭ samsonanta kaj kies signifo estas: „Mi ne povas kompreni“.

Ĉar Frans ne moviĝas, *Haulqueur* paŝas al li skuante lin per la brako:

— Transturnu ciajn poŝojn!

Kion babilas la serĝento? La pulmojn jam ŝvelitajn de la forta aero de la erikejo, lian tutan koron de senriproĉa knabo ribeligitan, Frans ne volas ankoraŭ kompreni kaj proteste li eklevas la ŝultrojn.

— Kio, li mienas protesti, la kanajlo? Mi cin punos! Konduku lin al la punĉambro. Sed unue, ci obeu, aŭ mi nudigas cin. Ha! ha! oni estas kapabla sin provizi por la vojaĝo. Certe mi kaptis la ŝteliston.

Li ne ankoraŭ estas tutellasinta la vorton, kiam Frans, duonfreneziĝinte, pripensante nek la disciplinon, nek la leĝon, nek la punkodon, sin kredante reliberiĝinta, ekprenis grejsan trogon, kiu staris sur la pavimo kaj ĝin ĵetis al la kapo de la insultanto.

*Haulqueur* falas, la kapon truitan, ellasanta flue sangon.

Nur estus forpasotaj kvarmil tricentdekdu minutoj. Ho! la fatalaj minutoj ĵus travivitaj; pro kio ci, malfeliĉa soldato, ne povas ilin kun cia tuta militservo rekomence vivi alimaniere!

Dum la duonroto levis la svenintan serĝenton, aliaj, laŭ ordono de deĵoranta oficiro, kondukis la ribelemulon al la punĉambro. Kaj pasante Frans aŭdis virojn de sia klaso, — kiuj estis forirontaj la postmorgaŭan tagon, kiam la klarionoj donos la signalon de la liberigo, — flustri balancante la kapon: „Li estos punata *minimume* je kvin jaroj!“

Sola en la karcero, li sin ĵetas ploregante sur la litaĉon, sin sternas elradikigante siajn harojn kaj kaŝas sian vizaĝon en siaj manoj por ne vidi la flavan konstruaĵon, kiu stariĝas antaŭ li, kiel je tiu bela somera vespero, kiam ĝi malbeligis la naturon liberan kaj feliĉan.

Kvin jarojn en Vilvorde, kiom da minutoj tio estas? Diru!

La nokto venas; la kontroliro pasis; klarionoj ordonas la enlitiĝon. La bruoj formortas. Ĉu ankoraŭ atendi? Ne, li ne estus sufiĉe forta. Pli bone estas decide agi. Pardonu lin, amatinoj kaj ci ankaŭ Dio mia, kiu ne kompatis lin! Ĉu malliberejo? Estas tro malmulte por lia krimo. Neatendante la verdikton de la milita juĝantaro, li sin kondamnis je la morto.

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

La letero, forsendita el la kazerno antaŭ la insulto, estas alveninta en Kessel, kaj Rup, granda knabo nun, ĝin legis kaj relegis antaŭ la bonanimulino.

Kvarmil tricentdudek minutoj! Rup scias kalkuli. Nur restas forpasotaj dumil centokdek, ĉar unu tago forpasis depost la foriro de la letero.

Morgaŭ la granda frato estos tie ĉi!

La matenon, kiam estis ankoraŭ malhele, Barbel grimpis, kiel ĉiutage, al la ĉambreto kie loĝis ŝia knabo. Ŝi estas preparonta la liton; ĉar la venonta nokto estos la lasta, dum kiu li devas sin sterni sur la pajlo de l' registaro.

Kiel ŝi longe retenas inter siaj senkarniĝintaj manoj tiun tukon, kiu denove tegos ŝian favoraton, tiun drapon, tre blankan je la klareco de la paliĝanta luno! Tiu antikva tolo, teksita de la patrino, estas tiel milda, tiel karesanta vespere al la lacigitaj membroj de la laboristo!

Tamen la vestaraĉo de ĉarpentisto, la jako kaj la velura pantalono, la griza antaŭtuko, la ĉapo kuŝas amasiĝe sur la seĝo apud la lito, kvazaŭ Frans estus ĵus ilin formetinta. La parfumo de rezino kaj de pargetovakso, per kiu tiuj vestaĵoj estis saturitaj, fordisiĝis por ĉiam, la faldoj faritaj de la elstaranta muskolaro kaj de la lumbo-

batoj de la laboristo baldaŭ malaperos, kaj la tago estas veninta, kiam la sankta adorantino, kiu enspiras ilian odoron kiel incenson kaj kiu kisas ilin kiel relikvojn, ne plu retrovas postsignon de l' kara foririnto! Sed ne gravas! Ĉu li ne ilin revarmigos, ilin modelos laŭ sia juna kaj vivanta korpo?

Ŝi ilin skuas, poste ŝi ilin pendigas molajn, rigidajn, streĉitajn al la riglilo de la fenestro.

Ŝi fine finas la pretigon de la lito, etendas la larĝan drapon blankan.

— Adiaŭ patrino!

Estis la voĉo de la tiom amata knabo!

Ŝi sin turnas kaj dum momento, je la lastaj radioj de la mortanta lumo, ŝi kvazaŭ vidas la korpon konvulsie tremantan en la vestaraĉo, kiun ŝi ĵus alkroĉis.

— Kiel stulta oni estas! — ŝi diras konsternite pro tiu stranga halucinacio kaj volante reagi kontraŭ malpreciza angorego: „Kie do estis miaj ideoj? Frans nur estos tie ĉi morgaŭ! Li ankoraŭ dormas tie!“

Ho jes, tie, malproksime de la vilaĝo, malproksime de la foirejo, malproksime de la vasta, vastega urbo, transportite en la eternan civiton!

# MARCUS TYBOUT[1]

## (RUĜA KERMESO.)

### I.

Iun vesperon ni diskutis la eternan temon pri la belo. Je la horo, kiam la Suŝonk[2]) sin miksas en la bluajn spiralaĵojn de la turkaj cigaredoj, oni ekparolis pri Don Juan, tiu neforigebla figuro pentrita de Tirso de Molina, scenigita de Molière, versigita de Corneille, muzikigita de Mozart, reprenita en malgravaj verkoj, studita, laŭdegita, komentariita konkure de Byron, Musset, Merimée kaj fine de Baudelaire, kiu ĝin starigis en kvin strofoj, sed kvin strofoj valorantaj ĉiujn versojn de *Namouna.*

— Tio certe mirigos vin, diris Charles T..., tiu amiko, ĉe kiu ni kunvenis — plenŝtopante sian nederlandan pipon, iun veran „Gouda“[3]), ĉar li opiniis afekta nian fumadon de persa papero — sed estas en la kamparo, ke mi renkontis la tipon, realiganta plej bone tiun legendan personon, kvankam li ne estis forportita de ŝtonstatuo kiel Don Juan Tenorio; lia fino, vi konsentos, kiam mi estos rakontinta lian vivon, ne estas malpli terura ol la klasika finiĝo.

---

[1]) Prononcu: Markus Tibu. [2]) Ĉina teo. [3]) Nederlanda urbnomo, kiu donis sian nomon al pipspeco fabrikata de la Goudaj loĝantoj.

Ĉu necesas diri al vi, ke mia Don Juan estis simpla kampulo de la antverpena Poldero, analfabeto, kiu neniam estis incitita per la legado de sentimentalaj aventuroj? Vi konas mian pliamon al la sentaŭguloj. Neniam mi povis kutimiĝi al la vivmaniero de tiuj aŭtomatoj, nomitaj burĝuloj, portantaj la saman nigran vestaĵon, la saman blankan veŝton, sufiĉe parolkapablaj por rediri kun sia gazeto: „civilizado — progreso — klerika hidro — ruĝa fantomo"; sed kiuj tute ne posedas animon kaj eĉ ne plu havas la instinkton de la homvizaĝa besto tiel trafe priskribita de La Bruyère.

Ĉiam mia simpatio iris al la malaltranguloj, al iliaj moroj, al iliaj pentrindaj loĝejoj, al ilia metafora lingvo, al ilia plaĉa kostumo. En la urbo, en la fundo de tiu bruega kvartalo de la haveno, mi alpaŝis laŭvice deŝarĝistojn kaj veturigistojn fortikajn, maristojn kaj boatistojn volvitajn en siaj fumaĵitaj vestaĵoj kaj en siaj blulanaj trikotaĵoj, kaj mi eĉ deziris la kontakton kun la nereguluIoj, la mizeruloj, la malsukcesintoj, vagantoj, la manojn en la poŝoj, laŭlonge de la kajoj, mokantaj la bonajn laboremulojn kurbitajn sub la ŝarĝego, aŭ apogantaj sin sur la balustradoj de la turneblaj pontoj kraĉante en la pramon de la transveturigisto kaj rigardante la manovron de la ŝarĝboatoj. Mi aŭdis edifajn diskutojn inter tiuj uloj, ofte stratbuboj, kies senbarbaj kapoj estas jam velkintaj kaj kies sensuka buŝo kraĉotusas la blasfemon kolorplenan kiel iliaj vizaĝoj, la ŝercaĵon grasan kiel iliaj ĉapoj.

Sed la krudulo, la viro de l' tero, fortmembra, ruĝvizaĝa, larĝaŝultra, tiu plaĉega kampulo montrante fortegajn kontrastojn: sovaĝeta kaj maldelikata, kvieta kaj kruelega, trovoluptema kaj sentimentala, cinika kaj bigota, kapablis, pli ol liaj urbaj samspeculoj, logi min. Tial

mia karmemora restado en la kamparo distingiĝas per spontanea amikeco. Dank' al tiu komplezema interfratiĝo, mi konis la heroan pendigindulon, pri kiu nun temas.

II.

La drinkejo *Babylonia* estas, se ĝi ankoraŭ ekzistas, la lasta domo de la vilaĝo Doersel en la kampina regiono, sur unu el la ŝoseoj kondukantaj al Nederlando. Aleo, aŭ pli bone, kiel oni diras en tiu regiono, „*drevo*“ de ulmoj, perpendikulara je la ĉefstrato ĝin apartigas de la bieno de la grafoj de V..., al kiu ĝi utilis kiel hotelo por la servantoj. Kvar arboj samspecaj kiel tiuj de la aleo, sed pli majestaj, duonkaŝas la blankŝmiritan domon, truitan per kvar fenestroj kun verdaj kovriloj kaj, apogante ĉe la trunkoj malglataj kaj muskoplenaj, benkoj ankaŭ verdaj alvokas la laciĝintajn pasantojn.

Dum la someraj dimanĉoj kaj ĝenerale dum la festaj tagoj, precipe en la ĉassezono, la drinkejo *In*[1]) *Babylonia* prezentas movoplenan viglecon kontrastanta kun ĝia kutima kvieteco, ĉar ĝi estas izolita el la vilaĝo. La veturiloj de la kastelo, kiuj prenis aŭ rekondukis al la stacidomo la invititojn de la grafa moŝto, same kiel la veturiloj de tiuj invititoj haltas antaŭ *Babylonia.* La malalta ĉambrego resonas de la kriaĉoj kaj de la bruaj interdisputoj. En la ombrolumo, la pipetoj intermite ardas. Ekstere, la ĉevaloj spiregas kaj piedfrapas, dum knabo ilin senmuŝigas per folioriĉa branĉeto.

Ĉirkaŭ 187..., kiam mi loĝis en Doersel, la drinkejo estis mastrumata de Nikkel Tybout, aŭ pli ĝuste de Lena, lia edzino kaj de ilia filino Jo; ĉar li, ĉarpentisto, lign-

---

[1]) *In* = en, flandra vorto. Georges Eekhoud lasas ĝin flandre en la franca teksto.

aĵisto kaj meblofaristo laŭokaze, laboris siaflanke kun iliaj kvar filoj Sus, Jaak, Toon kaj Marcus, ĉu en la ejo apud la drinkĉambro, ĉu sur konstruejo.

*Babylonia* baldaŭ fariĝis mia plej ŝatata promeno. Duona horo sufiĉis por atingi ĝin, ĝenerale estis vespere. Alveninte, mi forgesis la tempon, kiam mi gustumis la bieron aŭ kiam Jo, la blonda buldiketulino, por mi ĝin pumpis, sed mi apenaŭ haltis, kiam la trinkaĵo ne estis sufiĉe diafana aŭ se la maljuna mastrino ĝin prezentis al mi. Tiuokaze mi eklaŭiris la ombran aleon, atingis la senbruan kamparon kaj rehejmeniĝis pasinte malantaŭ la vilaĝo tra la Poldero.

Vintre mi kutimiĝis ludi bilardon.

Dum la plej mallongaj tagoj, la Tybout-oj forlasis la laborejon je la kvara posttagmeze. En niaj vilaĝoj la metiistoj malofte laboras je la artefarita lumo. Tiam komenciĝis sub la okuloj de Jo, nia „markanto“, longaj bataloj de „karambolo“, dum kiuj la samaj mallertaĵoj estigis la samajn mokridojn kaj dum kiuj la maliculino, juĝanto kiam okazis malakordo, defendis ekscese siajn samfamilianojn kaj ridis pro mia kolereta mieno.

La mastro, unu aŭ alia el liaj filoj, ofte ili tri, estis miaj kunludantoj. Marcus, la plej juna, ĉeestis malofte tiujn kunvenojn; tion mi tre bedaŭris, ĉar li estis certe la ano plej interesa de tiu familio, kies aliaj anoj estis nur homoj flegmaj kaj inertemaĉaj. Mastro Nikkel, ĉiam laboradante, ĉiujare ŝparis belan sumeton. Kaj, malgraŭ siaj sesdek jaroj, li multe laboris kaj regis siajn filojn per fera mano.

Marcus estis ĵus fininta sian trijaran militservon en lancista regimento, kaj ĉion, kion la kutimo pri la eleganta uniformo, la kontakto kun la urbanoj, la vizitado de la drinkejoj kaj de la koncertkafejoj kaj precipe la

amfavoroj povas aldoni al la senĝena sintenado de inteligenta vilaĝano, ne malbone aspektanta, li kunportis en sian landon. La ĉapeto, lokita sur la orelo, rememorigis pri la kazerna ĉapeto kun blanka ornamtufeto; lia dorso rektiĝis, lia torso konveksiĝis tiom fiere en sia laborjaketo, kiom en la ŝnurgalona vesto; la manon sur la zono li ludis per la ligiloj de sia antaŭtuko aŭ per sia ilpoŝo kiel per la manrimeno de sia sabro kaj laŭ lia irmaniero, kun la kruroj iom arkiĝintaj, la kalkanoj eksteren, kaj kun eta koksbalancado, oni rekonis la viron, kiu kutimas porti spronojn kaj premi ĉevalon inter siaj genuoj. Li estis blonda kun profundaj okuloj bluaj kaj liaj trajtoj similis tiujn de Jo.

Dum la labortagoj, reprenita de la patra metio, li plenumis multan laboron kun miriga vigleco. Fajfante inter siaj dentoj, kiel iam je la striglado, la klarionariojn de l' regimento, li uzis taŭge la rabotilon kiel la striglilon; kvazaŭ pajloviŝis sian stablon kaj enigis la najlojn kiel en la hufon de sia ĉevalo. Sed kiam la suno malleviĝis, forlasinte la laborilojn, li tuj formetis la longan griztolan antaŭtukon odorantan laŭ ligno rabotita kaj laŭ pargetovakso, por sin vesti per la blua kitelego. Kaj, bonan vesperon al ĉiuj! — li subite ekmalaperis. Kiam mi informpetis pri li, liaj fratoj eklevis la ŝultrojn kun supereca mieno kiel tiu de la homoj supersatiĝintaj; la ĝentila Jo ruĝiĝis kiel pomo „belflora“ [1]), kaj la patro murmuris inter siaj dentoj parolojn malmulte komplezajn al la paroĥaninoj de Doersel stulte enamiĝintaj en lian filon. Tamen, kondiĉe ke la laboro estis plenumita, la maljuna Tybout lasis plenan liberecon al la knabego: li preferis sian filon voluptema ol drinkema. Fakte,

[1]) Pomspeco.

Mark preskaŭ ne trinkis; nur la virino lin ebriigis kaj li uzis je la kermesoj la plej grandan parton de sia mono, pagante valsojn aŭ donacante galanteriaĵetojn al siaj amikinoj.

Neniam birdo bekpikis tiom da maturiĝantaj ĉerizoj kiom tiu aminduma sentimulo prenis da ruĝegaj virgulinoj. Li ne bagatele perdis sian tempon kaj mokis tiujn simplulojn, kiuj, post amsopira pilgrimado de *herberge* al *herberge*[1]) rekondukas al ilia domo matene, kaj netuŝante ilin, la junajn virinojn incitetitajn pro iliaj iluziaj amesprimoj. Ha! li ne estis kiel tiuj parolemaj kaponoj, kiujn la elreviĝintaj fraŭlinoj venĝpunas en nia regiono, publike ilin vangfrapante. Kaj ĉar neniu eraras pri la signifo de tia kareso, la fanfaronulo malfacile trafos virinon, al kiu plaĉas lia nemateria amado.

III.

Marcus, la obstinega ĉasanto, etendis la kampon de siaj aventuroj. Li traesploris la ĉirkaŭaĵojn de Doersel je pluraj kilometroj. Samtempe kiam li elnestigis la belulinojn de la „Poldero“, plaĉe diketaj kiel koturnoj, la malfeliĉaj filinoj de la erikejo, ĉasaĵo sovaĝa, malmildega, lasis sin kapti en liaj laĉoj. Li direktis samtempe plurajn intrigojn; mi konis kvar samtempajn amatinojn de li: la farmulinon de Crandoren; gracian kaj koketan bovgardistinon de la Dunlando; legomvendistinon de Telem kaj la ĉambristinon de la grafino de V... Oni eĉ asertis, ke la grafino longtempe dividis kun la servistino la karesojn de tiu malkrudigita vilaĝano.

En la komenco li profitis el ĉiuj liberigoj. La forlasitaj virinoj pardonis lin. Li ne forlasis ilin neesper-

[1]) Herberge — malnova vorto ankoraŭ uzata en la priskribata regiono. Temas pri drinkejoj.

ante revenon. Liaj revenoj, liaj reamoj estis ofte pli pasiaj ol liaj antaŭaj korligiĝoj.

Fine, ĉar ĉiuj ne estis tiel paciencaj kaj abnegaciemaj, la aferoj ekmalboniĝis. Gravedaj fraŭlinoj logike intencis lasi siajn naskotojn al la zorgoj de la plej vivforta inter siaj obeigintoj. En la drinkejo de Tybout resonis la afektaĵoj de la eksamatinoj, la minacoj de iliaj naturaj protektantoj. Vane la maljuna Tybout, laca pro tiuj kriaĉoj kaj la malfeliĉa patrino, malkvieta pro la honorŝtelisto, lin konsilis sekvi la ekzemplon de liaj pliaĝaj fratoj, laŭvice parigitaj kaj instalitaj. Kiam pri tio ektemis, li fajfetis rekantaĵon de la lasta kermeso, frapante la takton sur la vitron, aŭ, se la admonoj atingis lin en la laborejo, li estigis el la rabotilo kaj el la segilo grincojn kaj ĝemojn tiel terurajn, ke la admonantoj forkuris, ŝtopante siajn orelojn.

Tamen iun matenon, lia patrino sukcesis lin cedigi kaj, decidinte fini sian fraŭlan vivadon, li sin direktis al la paroĥestrejo kun sia lasta kaptitaĵo, la ĉarma Siska, filino de la ŝuisto Simons.

La paroĥestro ne malmulte miris, vidante eniri en sian domon tiun faman amaĵiston! Sed la mirego de la sankta viro fariĝis konsternega, kiam Mark estis diranta la celon de tiu vizito.

— Kio? Ĉu vi intencas edziĝi, vi? La plej granda malbonulo de la paroĥo! La mondo certe inversiĝos. Tia eksterordinaraĵo anoncas almenaŭ la venon de antikristo. Nu, amiko Tybout, reprenu viajn sentojn aŭ redonu miajn al mi. Unu el ni revas nunmomente. Kaj vi, Siska, mia infano, ĉu vi konas tiun, kiun vin amindumas?

— Ni interkonsentas, sinjoro Paroĥestro. Ĉu nevere, Siska? — diris Mark ne lasante sin influi.

Siska ruĝiĝante, respondis per malforta jeso:

— Nu, — rediris la paroĥestro, — tiuokaze, ni ekzamenos. Neutilas tamen tro rapide agi. Revenu post ok tagoj.

Semajno forpasis. La tago alveninta, nova sonorigo je la paroĥestrejo, nova eniro de Marcus Tybout, dimanĉe vestita kaj preskaŭ solena, puŝante antaŭ si fraŭlinon mallertan kaj konfuzan.

— Sed, — mirkriis la paroĥestro ekzamenante la belulinon, — kion tio signifas, amiko? Mi ne estas straba, tamen kaj mi rekonas, ·tie ĉi estantan, Mietje Purss, la nevinon de farmulo Nagels, kaj lastfoje vi kondukis al mi Siska Simons.

— Mi pripensis, sinjoro Paroĥestro. Vere tiu ĉi pli taŭgus kaj se vi volus anonci . . .

La pastro preskaŭ koleriĝis, ĉar ĉio tio ege similis veton de senhonta ŝercafektulo, sed esplorante la fizionomion de la lignaĵisto, li trovis en ĝi mienon tiel sinceran kaj naivan, ke la kolero lasis lokon ĉe la bona paroĥestro por pacigema rideksplodo.

— Aŭskultu, mia filo, — li diris al Mark, — malfacile reseriozigante, ĉar vi profitis el mia unua konsilo, vi obeos alian. Atendu ankoraŭ ok tagojn, kaj se via korinklino al Mietje daŭras ĝis tiam, mi promesas anonci oficiale la edziĝon.

Pro la dubo esprimita de la pastro, Mark protestante premis milde la diketan manon de la brunulino kaj metis en sia longa rigardo kareseman promeson de eterna pasio.

— He! he! — diris la bonulo, — ne tro fidu tiun kareslogulon, lastfoje li faris la samajn okulojn al la alia.

Kaj li konis tiun viron, la pastro de Doersel!

Post kelkaj tagoj, Marcus anstataŭigis per la blonda Veva Mollendraf siajn du unuajn fianĉinojn kaj ĉiujn siajn antaŭajn amatinojn. Li opiniis senutile fari trian provon ĉe la paroĥestro. Li ne konsistis el tiu faruno, per kiu oni formas la edzojn.

Malfeliĉe, maroderi fariĝis danĝere.

Kiam mia ŝtelĉasisto estis nur trompinta fojnistinojn kaj bovgardistinojn, la eminentaj paroĥanoj mokis la viktimojn, speco malmulte interesa, diboĉulinoj, kiujn Marcus multe honoris. Sed kiam la junaj heredontinoj de riĉaj bienposedantoj, iliaj edzinoj, iliaj fratinoj, iliaj fianĉinoj sin kompromitis kun tiu koketulo kiel la plej vulgara servantino, oni ne plu ŝercis. La rivaloj forpuŝitaj, la edzoj senposedigitaj amasiĝis kontraŭ tiu koruptanto. Ĉiuj viroj de la regiono kuniĝis. Estis nur senfina krio kontraŭ li. Ne pli, ol li estis zorginta pri la klaĉoj ripetitaj en la vilaĝo, li timis tiun ligon de limfaj amindumantoj kaj de nekapablaj grizbarbuloj. Ĉu ili ĉagreniĝis? Des pli bone!

Sed liaj malamikoj ne plu kontentiĝis minacante.

Se li nokte eliris, viroj kaŝitaj je la bordo de l' vojo sin ĵetegis sur lin kaj tiam okazis interbatado, en kiu li redonis batojn, sed kie, ĉar la kontraŭa forto estis tro potenca, fine li estis venkita. Tiam li reeniris en *Babylonia,* li, la dezirato de la virinoj de Doersel, kun la okuloj kontuzbluiĝintaj, la vangoj kovritaj per gratvundoj, la korpo tute kontuzita.

La maljuna Tybout skuis la kapon antaŭdirante malfeliĉaĵojn, la patrino kaj la fratino petegis sian multamatan Marcus, forĵeti pro amo al ili tiujn sangajn konkurojn, la fratoj malkonfesis kiel sian tiun nekorekteblan diboĉulon, trenanta la nomon Tybout en la skandalon kaj en la kridisputojn.

La hajlego da bastonbatoj ne lin ŝanceligis: la brusto restis bona kaj la karno postulema. Tiuj interbatoj, en kiuj li kontraŭstaris je bando de aĉuloj, faris lin pli interesa ol iam al la virinaj okuloj.

Je la epoko de sia kunligado kun Genova Mollendraf, filino de riĉega farmisto de la Cikadmonto, domaro de Doersel, li emis al Fine Wouts, fianĉino de la longa Mil Severd, la ĉarfaristo, kaj pruvis tion tiel bone al ŝi, ke Mil ilin kaptis en la korto de la farmobieno de Wouts, interplektatajn sub duontegmento, tro ameme okupatajn por eĉ pensi pri la krudulo, kiun ili kredis en Stabrouk, je dek kilometroj de tie. Mil, tiel timema kiel li estis altkreska, kontentiĝis rompante la edzinigon kaj ne plu mienante konkuri kun la diabla lignaĵisto pri la ŝanĝanima Fine. Sed unu monaton poste, iun vesperon, sur la ŝoseo al Putte la salajristoj kaj la anoj de la ĉarfaristo atakis Marcus Tybout. Dekope kontraŭ unu, ili rapide lin senkonsciigis kaj lin lasis sur la pavimo kredante lin mortinta.

Tiufoje la afero venis antaŭ la pacjuĝisto. La ĉaristo kaj liaj servantaĉoj preskaŭ tuŝis la malliberejon. Marcus restis en lito dum tri semajnoj. Li revenis el malproksime kaj tamen li ne profitis el tiu leciono.

## IV.

Mi alpaŝis al *Babylonia*, kiam mi lin renkontis; mi iris al li, mi estis kontenta vidi lin surpiede. Li estis iom paliĝinta, sed la okulo reviviĝis kaj li paŝis tiel malheziteme kiel ĉiam. Li estis vestita per sia laborkostumo kaj li portis sian ilarsakon. Dum ni vojiris, mi petegis lin regi sin kaj ne spitegi tiujn furiozulojn, kiuj fine lin mortigus. Li ne ŝajnis esti konvinkita pri tiu danĝero.

— He! — li diris, laŭkutime gajema kaj korelverŝema. — Ĉu mi estas kulpa, sinjoro, pri la beleco de la najbarinoj aŭ pri la nekapableco de iliaj ĵaluzuloj? La fruktojn al tiu, kiu havas la sukon! Jen la sezono, kiam la burĝonoj maturiĝas sur la branĉoj kaj kiam la unuaj floroj formiĝas. La gemerloj pariĝas: ni imitu ilin. Al mi, fraŭlinoj, amemaj fraŭlinoj! Mi sufiĉe fastis!

— Kien ci iras labori ankoraŭ nun? — mi demandis lin, vidante lian ekipaĵaron. Vesperiĝas. Resaniĝanto malprave riskas sin en la vesperoroson.

— Labori! — li diris ekridegante. Fakte temas pri laboro! Mi nur volis erarigi la fratojn kaj mi pretekstis ripareton ĉe le sekretario . . .

Kaj li pretiĝis ekiri vojeton kondukantan al la Cikadmonto. Mi divenis, ke li iris al Veva Mollendraf kaj opiniis, ke estis devo averti lin, ke tiu ĉi, sciante pro kio la salajritoj de la ĉarfaristo estis lin atakintaj, ne farus bonan akcepton al la feliĉa rivalo de Mil Severd.

— Mi pli bone ŝin konas, — li respondis ĉiam gajeme. — Ŝi komprenas, ke Fine Wouts nur estis sendaŭra amuzaĵeto kaj ke ŝi, Veva, restas la plej amata el la amatinoj. Veva min alvokas; estas necese, ŝi skribas al mi, nin vidi hodiaŭ vespere.

— Mark, estu prudenta! Se la Mollendraf-oj eksciinte tion, kion ĉiu ripetas en la vilaĝo, cin traktus kiel la bando de Mil Severd!

Mi volis lin reteni, incitate per nedifinebla timo.

Ĉu li divenis la simpation, kiun mi havis por li? Li ŝajnis pripensi, heziti, kaj lia kala mano longe premis la mian kaj ĝin skuis nedecidante ĝin forlasi.

Mi ne forgesis eĉ unu detalon de tiu malseketa junia vespero. Varmetaj akvecaĵoj estis kuŝigintaj la hel-

verdajn spikojn sub la kadavre sepia nigro de l' krepuska ĉielo. La ranoj, kuraĝigitaj de la ekpluveto, eliĝis el la kanejoj kaj sin ĵetis en la marĉetojn. Laŭmezure, ke la mallumo estiĝis, ĉiuj spiroj de la svena kamparo, la susuradeto de la foliaroj kaj de la herbo kunmiksiĝis en duondormigan muzikon. Kraketis cikonio en la proksimeco de la Cikadmonto. La antaŭan tagon, la pluvego estis rompinta poplon; la arbo kuŝis tra la vojeto, kaj ŝajnis bari la vojon al iu, kiu devos iri tiuflanken.

— Nu, — li diris pli serioze kaj per voĉo malpli certa ol kutime, — bonan vesperon, sinjoro, kaj dankon pro via kompleza avizo. Sed ĉiam mi nenion timis.

Kaj li transpaŝegis la falintan arbon.

Surloke mi restis kaj lin konsideris tiel atente, kun profundiĝo tiel intensa, ke neniam lia bildo paliĝis en memoro mia.

Per kia stranga rilatiĝo tiu juna frenezulo, tiu diboĉulo ĝenerale sufiĉe triviala, al miaj okuloj vestiĝis per karaktero preskaŭ sankta? Iun momenton li sin returnis kaj mi ne plu vidis en li la ekssuboficiron. Lia vizaĝo nobligita, frapita per lasta radio de la subiranta suno, alprenis esprimon seriozan kaj suferan. Lia granda antaŭtuko lin vestis kiel la tuniko de levido, lia kasketo kovris lian kapon kiel unu el tiuj ĉapoj de la antikvaj oferpastroj, kaj la adiaŭo, kiun per mangesto li sendis al mi, pleniĝis per tragedia majesteco.

Samtempe, la malĝoja kraketado de la cikonio rekomenciĝis. Kaj mia koro premiĝis, dum mi pensis pri la superstiĉo de la krudulo, kiu vidas en tiu granda blanka birdo la antaŭdiranton de sia hejmsorto. Super kiu pajlotegmento forlasita de l' ĉielo plorĝemas tiu voĉo?

La plumbokoloraj nubegoj fermiĝis, estingante la sangan lumeton, la birdo eksilentis kaj la malpreciziĝanta

silueto de Marcus Tybout enprofundiĝis en la vaporojn de l' vespero.

Mi ne plu revidis lin. Sed tro facile mi povis restarigi per mia intima kompreno de lia karaktero kaj per la konfeso de la Mollendraf-oj tion, kio okazis post nia renkonto.

V.

La domaro de la Cikadmonto regule dispartigas sian dekon da fajrujoj sur kvardek hektara spaco. Oni renkontis la unuan kaj la plej ĉefan de tiuj farmobienoj je cent metroj venante el la ĉefstrato. Ĝi apartenis al la patro de Veva, vidvo, skabeno de la vilaĝo Doersel, kiu ĝin ekspluatis kun siaj tri filoj: Bert, Gust kaj Pol.

Fons Mollendraf, la mastro, estis astma mallongkreskulo, kun vizaĝo timkolora, okuloj malgrandaj kaj grizaj, vangoj varioldifektitaj, frunto mallarĝa, mentono hokforma, nazo plata, lipoj kunpremataj kaj mokantaj, oreloj klinataj, haroj gluecaj, brakoj senfinaj, trunko tro longa kaj kruroj tro mallongaj.

Bert, la unuenaskita filo, dudekokjara timemulo, estis dufoje pli granda ol sia patro, prezentis ĝibetan dorson, profilon kvazaŭ tranĉilklingo, kie loĝis du marverdaj okuloj. Li havis manojn grandegajn kaj piedojn, kiuj konsternis Pier Jan Klomper, la lignoŝuiston.

Post li venis Gust, dudekjara brunulo, sufiĉe beltalia, fiera kaj malvirta, kaj la plej sennaivigita el la tri junuloj. Poste estis Pol, la plej juna, ruĝharulo, baldaŭ militservonta, malgracila kaj lumboforta, kun vizaĝo larĝa kaj pufvanga, turmentita de ĉiama gajemo, kiu donis al li la aspekton de kortobirdo supersatigita kaj malfermanta la bekon por enspiri, kun tiu nuanco, ke la beko similis dorsofinon.

Triope ili nur havis solan volon: tiun de sia patro. Ili sciis lin malbona, kapabla por plifavori unu el ili en la heredo. La farmisto estis dresinta sian duan filon, la plej obstine kontraŭstarantan, farante el la du aliaj sentaŭguloj du blindajn ilojn. Nun, Gust laboradis tiel obeeme kiel Bert aŭ Pol. Estante la plej malica kaj la plej senkora al la laboristoj, li prezidis la prilaborojn, la semadon, la rikoltojn. La longa Bert direktis la ĉarojn, kondukis la sterkon, liveris la furaĝojn al la urbaj klientoj. Kaj Pol paŝtis la bovinojn kaj draŝis.

Je la tagoj festaj aŭ kermesaj, ĉiu ricevis de sia patro duoblan guldenon. Bert, la longa kuris perdi sian monon ludante per la kegloj aŭ alimaniere kun pakveturigistoj aŭ kun aliaj kamaradoj de l' ĉefstrato; Gust varbis inter siaj fojnistinoj la malpli antipatian, kuntiris ŝin je pluraj kilometroj el Doersel por esti pli libera, vizitadis kun ŝi la drinkejojn de nekonataj vilaĝoj, ŝin ebriigis, batadis ŝin kaj fine falis kun ŝi sur la bordon de iu deklivo aŭ en senakvan fosaĵon kaj devigis ŝin obei al ĉiuj liaj malĉastaj inventoj. Kaj Pol, drinkante jam de la mateno kaj ebria je meztago, forpasis la alian tagduonon fordormante sian alkoholon, sternite flanke de siaj bestoj kaj per sia ronkado preskaŭ superante ilian blekadon.

Veva, ilia fratino, plejeble similis al Gust, sia ĝemelo. Ŝi estis belkreska virino, kun mameca brusto, ronde modelita, dika postaĵo, larĝaj koksoj, kruroj kaj brakoj karnoriĉaj, sed ne malproporciaj. Ŝia vizaĝohaŭto brilis kvazaŭ la ŝelo de vina pomo; ŝiaj helaj okuloj de alaŭdfalkoj maltime konkuris kun tiuj de la ĉarkondukantoj. Ŝi estis parolema kaj la junuloj de la paroĥo antaŭdiris, ke ŝi pasigos noktojn paradizajn, sed ankaŭ tagojn inferajn al tiu, kiu edziĝos kun ŝi. Do, malgraŭ siaj fizikaj me-

ritoj kaj sia dezirinda heredparto, ŝi mallogis la svatiĝantojn. Ŝi forsendis la filojn de la plej riĉaj bienhavantoj de la regiono. La reputacio de la patro kaj de la tri filoj, teruraj viroj, forpelis la malriĉajn amindumulojn.

Sed Marcus Tybout ne timis tion. La fiera Veva ne pli malcedis ol la aliaj. *Male*, ŝi faris la duonan vojon al la renkonto de lia deziro. Konante la ŝanĝemon kaj la multajn aventurojn de Marcus, ŝi sentis por li unu el tiuj doloraj pasioj, kies emociegojn stimulas kaj ekscitegas la ĵaluzeco. Ŝi sovaĝe lin amis kaj volis lin tute konservi, neniam lin delasi. Pro tio, kiam ŝi pensis pri ebla forlaso, mortigaj vaporoj leviĝis al ŝia cerbo.

Ilia interligo daŭris jam de pluraj monatoj; kaj la sprita junulo ĉiuvespere eniĝis, proksimume je meznokto, en la kuirejon de la Mollendraf-oj. Genoveva malŝlosis la pordon kaj apud la ĉambro de la patro, kontraŭ la ĉambreto kie dormis la tri fratoj, ambaŭ tremetante pro ĝuegiga korpremateco, ili komencis longajn konversaciojn el kiuj la vortoj estis forigataj por lasi lokon al la plej elokventa pantomimo.

Tiun junian vesperon, kiam Marcus ĉirkaŭirinte la farmobienon eniris en la korton kaj ĝin trairis eĉ ne estigante bojon ĉe la granda nigra hundo kutimiĝanta je liaj vizitoj, Veva lin atendis ĉe la pordosojlo. Estis tre frue; sed en sia skribaĵo la ruzulino estis avertinta la amanton, ke, devante resti en Nederlando, pro malsimpla vendo de plugiloj kaj de brutaro, neniu el ŝiaj familianoj estus hejme.

Kiam li malfermis la brakojn por ŝin altiri al si, ŝi ĵetiĝis sur lin kun nerva eksciteco kaj, ekploregante, ŝi konfesis al li katastrofon: ŝi estis graveda. Sufiĉe malĝojante kaj konfuzite pro tiu nova malfeliĉo, li kompatis

ŝin kaj serĉis konsolajn vortojn. Ŝi lin kuntiris en la ĉefan ĉambron. Li provis ŝin kvietigi. Sed kun kvazaŭ febra parolrapidego ŝi elverŝis sian koron, parolis pri riparo, pri edzinigo, pri la skandalo, pri la kolerego de la kvar viroj, kaj fine ŝi riproĉis al la lignaĵisto pli kaj pli honta, elekti tiun malfeliĉegan momenton por sin trompi kun malbelulino. Marcus solene certigis sian penton kaj sian konstantan korinklinon, kulpigante sendaŭran blendiĝon pri sia malfideleco. Li nur amis ŝin, sian Veva-n, kaj tion li estis tuj pruvonta venke al ŝi. Li revenis al ŝi dezireganta ŝian ĉeeston kaj ŝian kontakton.

Ju pli Mark elpensis konsolojn kaj karesojn, des pli ŝi plorĝemis. Li estis metinta ŝin sur siaj genuoj kaj susuris varmajn parolojn en sian plaĉe grasetan kolon. Spiregante, nun ekscitate de tiu sufero, li parolis pri amposedo, ŝi respondis per edzpeto, kaj ĉar li ŝajnigis sin surda, ŝi kolere baraktis, laŭtigis la voĉon kaj minacis ĉion konfesi al sia terura patro. Krizo de ĉagrenlarmoj interrompita de riproĉoj skuis ŝin. Subite ŝi liberiĝis malkvietege kaj furioze; minacordonis al li, ŝin edzinigi.

— Ha! pro tio, ne! — li respondis sendube bedaŭrante sian malobeon al mia konsolo. — Kaj ĉar mi tiamaniere estas akceptita, bonan vesperon, mia karulino...

Li leviĝis kaj sin direktis al la pordo de la kuirejo, por atingi la korton.

Sed antaŭ ol li estis tien alveninta, tiu pordo malfermiĝis.

Subita lumo plenigis la ĉambron.

Mallongkreskulo eniris portante brulantan kandelon; tri aliaj individuoj akompanis lin. En tiu palega mal-

grandulo kaj en la tri kunestantaj krudulоj, Marcus Tybout rekonis Fons Mollendraf kaj liajn filojn. Ŝi lin estis perfidinta.

## VI.

— Bonan vesperon, Marcus, mia knabo, ne ĝenu vin. Mi estas kontentega pro nia renkonto... Ni profitos tiun okazon por paroli... Veva, mia infano, iru en la kelon preni kruĉon da malnova *Schiedam*[1]), la plej bona; kaj alportu kvin glasojn... Sendube ni devos trinki kiam la afero estos aranĝita... Sidu do, Mark: tiamaniere, ni kviete kaj prave interparolos. Ĉu ne?

Tiuj paroloj estis prononcitaj kun voĉo subpremata, kiu pensigas al tiuj blankaj metalkoloraj nuloj plenigitaj je kaŝita elektro kaj kies eksplodoj fulmomortigas.

La kulpulo bone komprenis; tamen li sidiĝis inter Bert kaj Gust. Je signo preskaŭ nevidebla de l' patro, sed kiun rimarkis la lignaĵisto, Pol lasis sin fali sur seĝon malantaŭ Marcus. La mastro, je la alia flanko de la tablo, sidis kontraŭ li. Kvarope ili malebligis al la lignaĵisto la forkuron.

Genoveva reeniris. Ŝiaj tremantaj manoj tintigis la likvorglasojn portatajn sur pleto.

— Estas bone, mia filino. Eliru nun. Ni vin alvokos, kiam ni vin bezonos.

Ŝi estis lasinta la pordon duonmalfermita. La maljuna Mollendraf leviĝis flegme por ĝin tutfermi; poste residiĝinte:

— Tio, kio estas farita, estas farita. Marcus, li rediris, Veva, nia multamata filino, pekis. Anstataŭ atendi ĝis kiam ŝia patro trovu edzon laŭ ŝia situacio, ŝi en-

[1]) Brandspeco trinkata en Nederlando kaj en Belgujo.

amiĝis en vin kaj vi tiel bone profitis tion, ke ŝi estas graveda el vi... Aliulo kolerus, Mark, kaj vin mortbatinte, li akceptus kaj publikigus la honton de la stulta infano; poste li atendus bofilon plaĉantan, kiu konsentus ne plu paroli pri la aventuro. Sed mi preferas, ĉar nia Veva vin amas, doni ŝin al vi kaj tiamaniere ebligi al vi ripari la malbonon. Vi akceptas, ĉu ne vere, Marcus?... Pol, malŝtopu la malnovan kruĉon... Mi diros, trinkante, kiel mi intencas instali mian filinon...

— Permesu, amiko, — diris la lignaĵisto, — sed vi komencas per la fino. Mi tute ne sentas la deziron edziĝi. Mi ĵus diris tion al Veva. Eble vi aŭdis tion.

— Tatata! Vi alimaniere opinios, — rekomencis la maljuna farmisto per la sama tono ironie bonanima — kaj certe eĉ antaŭ ol foriri el ĉi tie. Malriĉulo kiel vi malŝatus tiun okazon?! Konfesu, ke vi agis tiucele? Kaj nun oni sin montras malŝatanta por kaŝi sian ruzecon! Ĉu vi ignoras, knabo, ke ne ekzistas pli serioza heredontino en la tuta regiono? Ĉiuj ne povas boparenciĝi kun la Mollendraf-oj... Mi esperas, ke ci ankoraŭ nun volonte ŝin rigardas?

— Via Veva multege valoras; ŝi estas belulino, tio estas nediskutebla; ŝi valoras pli ol via tuta havo, eĉ enkalkulite al tio viajn tri filojn — tio ne ofendu ilin.

... Sed Veva neniam estos mia edzino.

— Kion babilaĉas tiu naivegulo! — ellasis la farmisto.

La granda Bert mienis leviĝi; Gust movigis siajn piedojn, svingis per la pendantaj kruroj, grincigis la dentojn, senpaciece promenigis siajn manojn sur siaj femuroj; Pol ĉiuflanken direktis el siaj grandaj fiŝokuloj rigardojn idiotajn kaj la sango marmorumis tiajn sensukajn vangojn.

Sed la mastro sin regis kaj refariĝis pli milda ol ĉiam:

— Unue aŭskultu miajn proponojn ... Ci konas mian kampon de la *Droeve-Wei* ... bieno seshektara, kun la domo staranta kontraŭ la ŝoseo al Bergen. Vi scias, miaj filoj, ke nur la kolorŝmiro por tiu domo kostis al mi kvindek guldenojn ... Mark, la kampo kaj la domo estas viaj.

— Konservu ilin!

— Kanajlo!

La tri seĝoj de la fratoj Mollendraf movigitaj de sama galvana fluo alproksimiĝis al Marcus, kiu, la manojn en la poŝoj, la krurojn etenditajn, la kapon malantaŭen, la okulojn demandantaj la ombrojn de l' plafono, eĉ fajfante la rekantaĵon de la lasta kermeso, balanciĝis kun maniero plej indiferenta.

La aliaj pufiĝis. Sed Fons Mollendraf, duafoje subpremante sian koleron, per gesto kvietigis sian senpaciencan filaron. Li denove ekkriis resumante laŭ la maniero de la notario Balduin prezidanta lignaĵaŭkcion.

Mi diras: mian domon kaj mian bienon de la Droeve-Wei ... Seshektaroj ... Tricent belajn guldenojn donotaj je la edziĝa tago ... Mi ripetas tricent belajn guldenojn ... Akceptu ...

— Nek la bienon, nek la domon, nek la monon ... Marcus Tybout sin ne vendas.

— Oni devus sendi Marcus Tybout al Gheel[1]) inter la frenezulojn.

— Jes, frenezulo! furioza frenezulo! — grumblis la tri filoj, kaj Pol, alnomita Plenluno, faris malantaŭ la dorso de la sentimulo gestojn rigidajn de strangolanto, kiujn Mark vidis en la siluetoj sur la plafono.

Kaj nun el la fundo de la apuda ĉambro venis ploregoj kaj ĝemoj virinaj.

---

[1]) Gheel estas belga urbeto, en kiu estas kolonio de lunatikuloj.

Marcus Tybout malestime ridetis.

— Milde! — ordonis la patro, obeigante refoje sian idaron. Kaj sin turnante al la pordo: „Ha! kvietiĝu, stultulino! Mi ne jam finis. Li cedos. Li devas cin edzinigi, Veva . . .“ Ci tamen diris ami ŝin, ci, la ŝtelanto de ŝia bona nomo!

— He! jes, mi ŝin amegas.

— Kaj kion ci deziras por ŝin edzinigi? Rapidu. Urĝas!

— Mi ne intencas edziĝi.

— Oni jam sufiĉe ŝercis . . . Mark, mi estas la patro de Veva kaj pro mia amo al ŝi, mi parolas al ci ankaŭ patre. Mi pensas pri la kreitaĵo de Dio, kiun ŝi portas en sia ventro. Kiel honestulo akceptu, Marcus! Mi forgesas kiamaniere ci penetris en mian hejmon; mi eĉ ne petos solan moneron de cia patro . . . Oni scios, en Doersel, ke la Mollendraf-oj estas sufiĉe riĉaj por reaĉeti sian honoron. Jen, krom la bieno de Droeve-Wei, mi donas al ci la bieneton de Dizekesseyk . . . Ĉu ne sufiĉas? . . . Kaj mi aldonos la bovinon nederlandan, mian diverskoloran beston, la favoraton de nia Veva . . . Fine, ĉiujare je la Kristnasko, mi sendos al ci la plej bonajn pecojn de mia grasa porko. Ĉu bone? Mi esperas, ke jen estas kondiĉoj . . . Ci certe ne plu hezitas?

— Mi neniam hezitos inter mia libereco kaj viaj ŝinkoj.

— Ĉu tio estas cia lasta decido?

— La tutlasta . . .

— Kaj mi demandas cin ankoraŭ unufoje: Marcus Tybout, ĉu ci volas, jes aŭ ne, edzinigi Genoveva Mollendraf?

— Estas tedege! La saĝaj personoj nun enlitiĝas.

. . . Mastro, kaj al vi, junuloj, la plej bonan ripozon . . . Kaj sin kapvestinte li leviĝis.

Sed la tri fratoj lin ĉirkaŭis, rikanis, kun ŝaŭmo je la lipoj, lin tuŝis per la kubuto, kaj per la pugno minacis lin. Posttagmeze la patro estis ilin ebriiginta, ilia elspirado ilin perfidis. Tute neatendite ili estis triope senjakiĝintaj.

Tiuj evidentaj provokoj venkis la kvieton de Marcus.

— Malantaŭen! Retenu viajn manojn! — kriis la kuraĝulo. — Malantaŭen! Kaj ĉar la kruduloj lin puŝis, li sin armis per fermhoko, prenita el sia sortimento, kaj vundis la vangon de tiu ŝvela Pol, kiu ĵus lin ekkaptis je la brako. Vidante sangon ili tute freneziĝis ... Ili alkuregis epilepsie kaj eligante insultojn.

— Bategu lin, miaj filoj! — kriegis la maljuna Mollendraf, senkonsciiĝinte kiel ili.

Post momento, la tablo rulfalis, la kandelo estingiĝis; la fama kruĉo da Schiedam krevigite elverŝiĝis sur la kahelo, la glasoj disrompiĝis kaj Mark, prenite de la tri batalantoj, rulis teren.

Veva alkuris pro tiu tumultbruego.

— Marcus, — ŝi ekkriis! — *Och God*[1]) kio okazas?

— *Fourt*[2]) *Judasino,* — respondis ŝia amanto, parigante ŝin kun la plej granda perfidulo.

— Ne enmiksiĝu; lasu nin! Li estos sufiĉe batita! — murmuris la maljunulo en la orelon de Veva.

Dume, la batoj falis sur la kapon de la sincerulo. Li redonis ilin laŭeble plej longdaŭre. Oni aŭdis la penigajn spirojn de la platigitaj brustoj, premitaj unu kontraŭ la alia, raŭkajn kriojn, malbenojn, blasfemojn, kolerplorojn, bruojn de kapoj kaj de la lignoŝuoj martelante la kahelon.

---

[1]) Skribita flandrelingve en la franca teksto. Esprimo, signifanta: Ho! mia Dio.

[2]) Insulto tradukebla per: foriru perfidulino.

— Cedu, kanajlego, aŭ ni dispecigos cin! — diris la maljuna Mollendraf.

— Kisu miajn test. . .![1])

Kaj kun akcento plej malestima, kiun li trovis, la sentimulo kraĉis al ili la malĉastan kaj egan insulton.

— Tiuokaze mortaĉu!

La buĉado rekomencis.

La sako de ferumaĵoj, ellasita en la interbatalo, estis malplenigita de la tri buĉantoj. Ili konservis neniun indulgon, frapis por finigi, senatente, per ĉio, kion atingis iliaj manoj; iloj kontuzantaj aŭ tranĉantaj, kejloj, ĉiziloj, cirkeloj, kroĉiloj, modlilo, borilo, ŝraŭbilo.

Dufoje ankoraŭ la heroa lignaĵisto sukcesis elliberiĝi. Li volis diri adiaŭon al la perfidemulino. Li alproksimiĝis kaj kriis en ŝian vizaĝon.

— Ci ankaŭ, kisu ilin, diabla hundino!

Pugnobato denove lin faligis.

Tiam duonfreneza, konsternigite pro la sango, ĉiuj ŝiaj venĝrevoj leviĝantaj al ŝia cerbo, Veva plenĝuis tiun buĉadon kaj siavice atakis. Ŝi volis lin mortinta, ekstermita, tiun fieregulon, tiun bravofanfaronulon! Ŝi kuniĝis kun siaj fratoj, sin ĵetis sur sian kaptitaĵon eligante raŭkajn kriojn. Ŝi enigis siajn ungojn en la okulojn de Marcus, elradikigis la buklajn fasketojn de la blonda hararo tiel ofte karesita de ŝi, distranĉis tiujn vangojn, kiujn ŝi estis superverŝinta per petegantaj larmoj kelkajn minutojn antaŭe kaj kies lanugo estis foruzita de ŝiaj voluptaj kisoj.

La tuta ilaro de la lignaĵisto estis provita sur tiu malvarmiĝanta korpo. Kaj tio kio kuŝis, malforte stertoranta,

---

[1]) Estas la plej malestima insulto, kiun uzas la flandraj kamparanoj. Mi kredas ke la mallongigo, kiun mi uzas, sufiĉe komprenigos ĝin al la leganto.

ŝviteganta, vundita je cent lokoj, kontuzita, dispecigita, traborita, segita, kun vestaĵoj disŝiritaj de la nuko ĝis la kalkanoj, ne plu similis homan formon.

Do la buĉantoj malpli forte frapis. Sufiĉe da mortigaj batoj estis donitaj. Kaj ili satiĝis je tiu agonio, kiun ili incitis kaj pikis, timante trofruan morton.

Nun, Marcus Tybout estis ricevinta sian parton.

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

# INTERNACIA MONDLITERATURO

La kolekto estas submetita al la gvidado de **Prof. D-ro Joh. Dietterle,** direktoro de la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko.
Ĝi enhavas nur la plej famajn verkojn el ĉiuj naciaj literaturoj. Ĝis nun aperis:

Volumo 1:

**Goethe, J. W. von: Hermano kaj Doroteo.** Eposo idilia. El la germana originalo trad. *B. Küster* 2a, korektita eldono. Kun antaŭparolo de *Prof. D-ro Joh. Dietterle.* 1922. 77 paĝoj. Kartonita.

Volumo 2:

**Niemojewski, A.: Legendoj.** El la pola originalo trad. *B. Kuhl.* Kun antaŭparolo de *Antoni Grabowski.* 2a, korektita eldono. 1923. 74 paĝoj. Kartonita.

Volumo 3:

**Turgenev, Ivan S.: Elektitaj noveloj.** El la rusa originalo trad. *A. Mexin.* 1923. 81 paĝoj. Kartonita.

Volumo 4:

**Raabe, Wilhelm: La nigra galero.** Historia rakonto. El la germana originalo trad. Prof. D-ro *Fritz Wicke.* 2a, korektita eldono. 1922. 64 paĝoj. Kartonita.

Volumo 5:

**Hildebrand: El la „Camera Obscura".** El la holanda originalo trad. *H. C. Mees.* 1923. 64 paĝoj. Kartonita.

Volumo 6:

**Irving, Washington: El la skizlibro.** El la angla originalo trad. *H. L. Elvin.* 1923. 64 paĝoj. Kartonita.

Volumo 7:

**Chamisso, A. de: La mirinda historio de Petro Schlemihl.** El la germana originalo trad. *Eug. Wüster.* 1922. 84 paĝoj. Kartonita.

Volumo 8:

**Stamatov, G. P.: Nuntempaj rakontoj.** El la bulgara originalo trad. *Iv. H. Krestanoff.* 1922. 80 paĝoj. Kartonita.

Volumo 9:

**Ŝalom-Aleĥem. Perec.: Hebreaj rakontoj.** El la hebreaj originaloj trad. *Is. Muĉnik.* 1923. 78 paĝoj. Kartonita.

Volumo 10:

**Puŝkin, A. S.: Tri noveloj.** El la rusa originalo trad. D-ro *A. Fiŝer.* 1923. 67 paĝoj. Kartonita.

**FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG**
**ESPERANTO-FAKO**

# INTERNACIA MONDLITERATURO

Volumo 11—12:

**Ariŝima, T.: Deklaracio.** Romano. El la japana originalo trad. *T. Toogua.* 1924. 125 paĝoj. Kartonita.

Volumo 13:

**Poe, Edgar, Allen: Ses noveloj el „Rakontoj de mistero kaj imago".** El la angla originalo trad. *A. Frank Milward.* 1924. 80 paĝoj. Kartonita.

Volumo 14:

**Balzac, Honoré de: La firmao de la kato, kiu pilkludas.** El la franca originalo trad. *Paul Benoit.* 1924. 75 paĝoj. Kartonita.

Volumo 15:

**Doroŝeviĉ, Vlas: Orientaj fabeloj.** El la rusa originalo trad. *Nikolao Hohlov.* 1924. 64 paĝoj. Kartonita.

Volumo 16:

**Sienkiewicz, Henryk: Noveloj.** El la pola originalo trad. *Lidja Zamenhof.* 1925. 64 paĝoj. Kartonita.

Volumo 17:

**Strindberg, August: Insulo de feliĉuloj.** El la sveda originalo trad. *Oskar Frode.* 1926. 69 paĝoj. Kartonita.

Volumo 18:

**Bertrana, Prudenci: Barbaraj prozaĵoj.** El la kataluna originalo trad. *Jaume Grau Casas.* 1926. 59 paĝoj. Kartonita.

Volumo 19:

**Ŝimunoviĉ, Dinko: Ano de l'ringludo.** El la kroata originalo trad. *Fran Janjiĉ.* 1926. 86 paĝoj. Kartonita.

Volumo 20:

**Eekhoud, Georges: Servokapabla. Marcus Tybout.** El la flandra (franclingva) originalo trad. *Léon Bergiers.* 1926. 71 paĝoj. Kartonita.

Prezo po volumo: Rm. 1.60
Duobla volumo: Rm. 2.50
Kvin volumoj laŭ elekto: Rm. 6.—

La kolekto estas daŭrigata.

**FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG**
**ESPERANTO-FAKO**

MABEL WAGNALLS

**PALACO DE DANĜERO**

(RAKONTO PRI MADAME LA POMPADOUR)

Tradukis el la angla originalo

**EDWARD S. PAYSON**

Honora prezidanto de la Esperanto Asocio de Nordameriko

1926. 206 paĝoj. Luksa tolbindaĵo 6.— Rm

„...Emocia amrakonto sur historia fono. Lerte elpensita romano, belstile kaj interese skribita kaj bone tradukita. La amrakonto: Juna, fajra nobelo amas la Pompadour, la favoritinon de reĝo Louis XV, sed lin amas simpla sed talenta knabino-orfino edukita en monaĥinejo. Post multaj aventuroj fine la juna grafo edziniĝas la orfinon, kiun li ekamis sincere. — La historia fono: famaj kasteloj de Versailles kaj Bellevue, Parizo, Louis XV, Pompadour, kortego, nobeloj, pastroj, belaj virinoj, lakeoj, paĝioj. Aventuroj, intrigoj, festoj, ĝojoj, suferoj ... sed la fino estas bona. — La romano respegulas la varian vivon je la tiama tempo, vivon de lukso kaj diboĉado ĉe la kortego, dum la popolo malsatas. Legante ĝin, oni bone komprenas, ke ĉio ĉi fine devis konduki al revolucio. — *La libro estas valora kaj bela, la desegnaĵo de l'kovrilo tre arta kaj certe ĉi tiu romano kuŝos sur la naskiĝtaga aŭ kristnaska tablo de multaj gesamideanoj.*" Heroldo de Esperanto (1926, No. 49).

„... Du principoj regas la mondon: malsato kaj amo. Domaĝe por ni pli regas malsato ol amo; sed jam pli kaj pli la amo forprenas de la malsato agadkampon. En la teruraj tempoj — 33 jaroj antaŭ la franca revolucio — malsatado de kampuloj estis tia ĉiutagaĵo, ke por nobeluloj estis nur kaŭzo de amuzo la komuniko, ke homo mortis pro malsato. La libro majstre pentras la malŝparemon de la Pompadour, la kruelecon de Louis XV a, la malplenecon de kortegaj plezuroj, kaj tra la rakonto fantomas la ombro de la Bastille, la terura malliberejo, en kies subteraĵoj politike nefidindaj personoj vivantaj estas enmasonitaj. — La stilo de la libro estas tre ĉarma, la traduko preciza, tial la legado estas plezuro. *La luksa arangô faras la libron ornamaĵo de ĉiu biblioteko.*"

La Socialisto (1926, No. 10).

**FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG**

**ESPERANTO-FAKO**

# ORIGINALA ESPERANTO-LITERATURO

## H. A. LUYKEN: Du Romanoj

**PRO IŜTAR.** Romano el la antikva Babela historio.
1924. 304 paĝoj. Bindita Rm 7.—

**Esperanto Triumfonta** (1924, No. 211): „... vereco de la historieca fono, majstreca karakterizado de la personoj kaj eleganteco kaj brileco de stilo kaj lingvo envicigas la romanon en la unuan rangon. Ĝi estas efektive unu el la plej bonaj kaj plej valoraj esperantaj original-romanoj, kiuj ĝis nun ekzistas..."

**Literatura Mondo** (1924, No. 12): „... Kore mi gratulas la verkiston, kies plej nova romano estas ne nur brila pruvo pri lia talento, sed samtempe la plej valora gemo en lia verkarjuvelo. La eleganta kaj facila stilo estas ĉefa allogilo de la libro, per kiu la verko donas tian valoraĵon al la leganto, kian li ne ricevas kutime en multaj verkoj, eĉ tro laŭditaj, de nia literaturo."

**STRANGA HEREDAĴO.** Romano originale verkita.
1922. 320 paĝoj. Broŝurita Rm 5.50, Bindita Rm 7.—

**Esperanto** (1922, No. 12): „... Sed neeble resumi tiun lerte aranĝitan historion. Komencinte legi ĝin, oni iras ĝis la fino, scivola pri la strangaj aventuroj, aŭ pri la sorto de l' personoj, aŭ pri la ama intrigo, kaj ne forlasas la libron antaŭ la lasta paĝo. Tio jam estas kvalito ĉe romano. Plie ĉi tiu estas verkita per flua, korekta stilo. Ĉiu samideano ne ankoraŭ leginte la novan originalan romanon de S-ro Luyken do povas havigi al si kelkajn horojn da honesta distraĵo kaj ĝudona legado."

**La Espero** (1922, No. 10): „... Mi legis preskaŭ tutajn noktojn kaj ne povis ĉesi antaŭ la fino."

---

## JEAN FORGE: Du Romanoj

**ABISMOJ.** Romano originale verkita. 1923. 150 paĝoj.
Broŝurita Rm 3.—, Bindita Rm 4.50

**Belga Esperantisto** (1923. No. 9/10): „... Kaj lia libro certe havos honorlokon en la biblioteko de ĉiu bona Esperantisto."

**Esperanto** (1923, No. 10): „... Ĉio en la libro estas laŭdinda kaj „Abismoj" estas valora riĉigo de nia originala romanaro."

**SALTEGO TRANS JARMILOJ.** Romano originale verkita.
1924. 192 paĝoj. Bindita Rm 5.—

**Literatura Mondo** (1924, No. 12): „... Plastika kaj vigla stilo, facila komprenebleco, luda legebleco, jen la plej fortaj flankoj de la verko. La aŭtoro akiris por si lingvaĵojn, kiu vaksmole konformiĝas al liaj pensoj, kiu estas frapante viva kaj sugestie impresa — ĝuste per sia simpleco kaj facileco."

**FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG**
**ESPERANTO-FAKO**

## D-ro EDMOND PRIVAT:

# VIVO DE ZAMENHOF

kun portreto de D-ro L. L. Zamenhof.

1923. 109 paĝoj. Kartonita: 2,50 Rm. Bindita: 3.50 Rm.

ENHAVO:

*Ĉapitro I:* La gentoj en Litva lando.
„ *II:* Infano en Bjalistok.
„ *III:* Gimnaziano en Varsovio.
„ *IV:* Studentaj jaroj.
„ *V:* Doktoro Esperanto.
„ *VI:* Idealista profeto.
*Ĉapitro VII:* Homarano.
„ *VIII:* Kongresaj paroladoj.
„ *IX:* Lingvisto.
„ *X:* Verkisto.
„ *XI:* Etika pensulo.
„ *XII:* Homo ĉe morto.

„... Zamenhof kaj Edmond Privat. Jen du nomoj, kiuj frapas mian atenton kaj igas min enprofundiĝi en ĉiujn liniojn dum la legado. La Majstro kaj lia fidela disĉiplo. La dua sekvas la vojon, montritan de la unua kaj per tio li faras la plej belan devon, plenumas la plej idealan taskon por bono de la tuta homaro. Kun sincera riverenco mi klinas la kapon antaŭ ili." (Literatura Mondo, 1923, No. 2.)

---

# HISTORIO DE LA LINGVO ESPERANTO

Deveno kaj komenco 1887—1900.

1923. 2a eldono. 74 paĝoj. Kartonita: 1.60 Rm.

ENHAVO:

*Ĉapitro I:* Esperanto kaj indo-eŭropaj lingvoj.
„ *II:* La esperanta vortaro.
„ *III:* Zamenhof, Deveno de Esperanto.
„ *IV:* Apero de la „Unua Libro"
„ *V:* Unua jaro. „La Dua Libro."
„ *VI:* Amerika Filozofia Societo kaj „Aldono al la Dua Libro".
„ *VII:* Nürnberg. Einstein „La Esperantiste."
*Ĉapitro VIII:* La Ligo. Reforma agitado.
„ *IX:* „Lingvo Internacia" en Uspala.
„ *X:* Franca Societo. „L'Espérantiste."
„ *XI:* La influo de L. de Beaufront.
„ *XII:* Esperanto en Ruslando. Interna Ideo. La spirito de la lingvo.

„... Prave oni postulas en Esperantaj ekzamenoj konon pri la historio de la lingvo. Plej utila ĝi estas al ĉiuj, kiuj devas gvidi kursojn aŭ fari paroladojn ... nenio pli bone instruas ol historio."

---

**FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG**
**ESPERANTO-FAKO**

# PAUL BENNEMANN:

Internacia legolibro

## TRA LA MONDO

**Ia parto: Por komencantoj.** Kun multaj bildoj kaj muzik-notoj. 1924. 3a eldono. 96 paĝoj. Kartonita. 1.50 Rm.

„... Jen vere utilega libro por la kursestroj kaj iliaj lernantoj. Bele presita sur bona papero kaj kun multaj delikataj bildoj kaj bildetoj, la libro estas vera *trezorejo* da bonaĵoj por la lernanto kaj certe allogas lin al la plua esploro de nia jam ampleksa literaturo.“ *British Esperantist.*

**IIa parto: Por progresintoj.** Kun aldono de 4 kompon-aĵoj. 1922. 144 paĝoj. Kun 12paĝa muzika aldono. Kartonita. 2.20 Rm.

„... Ni devas admiri, ke tia ampleksa verko kiel ‚Tra la Mondo‘ estas tiom zorge preparita; multon ni ŝuldas al la klopodado de s-ro Bennemann; en ĉiu serioza Esperantista librokolekto ‚Tra la Mondo‘ trovos indan lokon flanke de la ‚Fundamenta Krestomatio‘. Ambaŭ havas apartajn kvalitojn, sed la novenaskita meritas apudesti sian neanstataŭeblan antaŭulon.“ *Esperanto.*

## INTERNACIA KANTARO

Kolekto de 64 popolaj kantoj el 26 nacioj. Kun aldono de 3 famaj koncertarioj (Händel-Mozart-Wagner). **Tekstaro.** 1922. (Formato: 11×15 cm.) 64 paĝoj. Broŝurita eldono —.60 Rm.

**Muzika eldono.** Aranĝita de Josef Achtélik, iama orkestr-estro ĉe la opero en Leipzig. 1922. (Formato: 19×13 cm.) 80 paĝoj. Broŝurita eldono 2.— Rm.; bindita eldono 3.— Rm

„... El la ĝis nun aperintaj Esperantaj kantaroj la nuna superas ĉiujn aliajn per sia riĉeco, belaspekto, internacieco. Povu rapida disvastiĝo de tiu tre valora kaj rekomendinda verko revigligi la kantemon en niaj societoj kaj kunvenoj, kaj ankaŭ rekompenci la laŭdindan laboron de l'aŭtoro.“
*Esperanto.*

**FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG**
**ESPERANTO-FAKO**

# L A  V E N D R E D A  K L U B O

11 diversaj, originalaj artikoloj
verkitaj de la Vendredoklubanoj en Leipzig.

Kolektitaj de

**Prof. Dro JOH. DIETTERLE**
Direktoro de la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko

Kun portreto de Dro **Alb. Steche** kaj kelkaj desegnaĵoj.
1921. 115 paĝoj. Broŝurita Rm. 2.40.

**ENHAVO:** Antaŭparolo. — 1. **Paul Bennemann.** La romantika verkisto E. T. A. Hoffmann kiel muzikisto. — 2. **Arthur Degen.** Instruo per laboro.—3. **Dro Johannes Dietterle.** Leibniz kiel „antaŭbatalinto por nia ideo“ de mondhelplingvo — eraro! — 4. **Ernst Franck.** Esperanto kaj la Frey-ligo.—5. **Walter Lippmann.** Pri la Lingvaj Respondoj de Doktoro Zamenhof. — 6. **Alfred Petzold.** La unuaj jaroj de Esperanto en Leipzig. — 7. **Hermann Rössel.** Serioza laboro. — 8. **Dro Emil Stucke.** Scienca teorio de Ostwald pri la koloroj. — 9. **Paul Wilhelmi.** Pri la insulo Korfu kaj la imperiestra kastelo Achilleion. — 10. **Elisabeth Wunderlich.** La ŝtata Saksa Esperanto-biblioteko. — 11. **Arthur Zealer.** Pri la Esperanto-movado en Britujo depost la fino de l' mondmilito. — Aldono (**Dro Dietterle**). Biografiaj notoj pri Dro Steche kaj resumo pri liaj poresperantaj artikoloj kaj alparoladoj.

**Ĉiu serioza Esperantisto legos kun granda ĝuo tiun modelstilan verkon.**

*JEN KELKAJ VORTOJ EL LA RECENZOJ:*

„... Tre diversspecaj estas la temoj donantaj fakte »al kelkiu ion«. Sed ĉiuj artikoloj estas zorgeme ellaboritaj kaj nepre legindaj. Tre bona estas la stilo de ĉiuj artikoloj kaj pura estas la lingvo, kies vivantecon ni spirite perceptas kaj sentas. La libro rekomendas sin mem per sia boneco laŭ enhavo kaj stilo.“ *Esperanto Triumfonta (1921, No 51).*

„... Mi citis ĉiujn aŭtorojn, ĉar ĉiu uzas elegantan, fluan, precizan lingvon, kiun oni legas kun vera ĝuo; la modela stilo honoras la verkintojn.“
*Esperanto (U. E. A., 1921, 9/10).*

**FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG**
**ESPERANTO-FAKO**

# EÜGEN WÜSTER
# ENCIKLOPEDIA VORTARO
## ESPERANTA-GERMANA

Kun speciala elmontro de la Zamenhof-a lingvuzo
La giganta verko aperas en sinsekvaj partoj.
Prezo po parto: Rm. 15.—
Ia parto: A—Ĉ (ĉerizo). IIa parto: Ĉ (ĉerko)— F (folio).
IIIa parto: F (folio)— I (iri). IVa parto k. c. en preparo.
Ĉiu parto, presita sur senligna papero, ampleksas
160 enhavoriĉajn paĝojn (formato 17×25 cm).

Ĉi tiu verko estas la plej grava scienca entrepreno esperanta, eldonata depost la komenco de nia movado. Ĝi estas verko, kiun ĉiu Esperantisto germana kaj negermana devas posedi. Por propagandistoj ĝi estos verko, kiu konvinkos eĉ la plej skeptikajn sciencistojn pri la valoro de nia lingvo por sciencaj kaj teknikaj laboroj ĉiuspecaj. Por iuj Esperantistoj kaj precipe por instruistoj kaj verkistoj ĝi estos plej valora libro.

*La Enciklopedio priskribas la tutan esperantan movadon de ĝia komenco kaj ĝian literaturon de la apero de la unua libro de D-ro Zamenhof ĝis la tago, kiam la Enciklopedio aperos kaj enhavas plue ĉirkaŭ 1000 paĝojn de alfabetaj informiloj: plena vortaro kun ĉiuj ĝisdataj teknikaĵoj (multe el ili ne havigeblaj pro ilia apero en malaperintaj gazetoj aŭ libroj); detala pritrakto de gramatikaj finaĵoj, prefiksoj kaj sufiksoj kun karakterizaj ekzemploj, plej ofte ĉerpitaj el la verkoj de la Majstro, klarigoj koncizaj pri ĉefaj organizaĵoj kaj specialaĵoj de la movado, ekz. Akademio, Lingva Komitato, C. O., U. E. A., Spesmilo, Homaranismo ktp.*

La teknikaj vortoj kaj esprimoj estonte elpensotaj kaj uzotaj aperos de tempo al tempo kiel periodaj suplementoj, tiel ke la verko mem neniam malnoviĝos.

**FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG**
**ESPERANTO-FAKO**